

KIEL ISRAELO ELPELIS LA PALESTINANOJN

(1947-1949)

Monda Asembleo Socia (MAS)

DE LA SAMA AŬTORO

Israë., une société bousculée. Vingt-cinq ans de reportages [Israelo, skuata socio. Dudek-kvin jaroj da raportaĵoj], Éditions du Cygne, Parizo, 2007.

Les historiens allemands relisent la Shoah [La germanaj historiistoj reinterpretas la judan genocidon], Complexe, Bruselo, 2002.

Le Mal-être juif. Entre assimilation et manipulations [La juda misfarto. Inter asimilado kaj manipuladoj], Agone, Marsejlo, 2002.

Kun Karim Bourtel: *Le Mal-être arabe. Enfants de la colonisation [La araba misfarto. Idoj de la koloniado]*, Agone, Marsejlo, 2005.

Kun Alain Gresh:

- *Proche-Orient: une guerre de cent ans [Proksim-Oriento: cent-jara milito]*, Messidor, Parizo, 1984.

- *Les 100 Portes du Proche-Orient [La 100 Pordoj de Proksim-Oriento]*, Autrement, Parizo, 1986, 1989 kaj 1992; Les Éditions de l'Atelier, Parizo, 1996.

- *Les 100 Clés du Proche-Orient [La 100 ŝlosiloj de Proksim-Oriento]*, Hachette, Parizo, 2002, 2003, 2005 kaj 2006.

- *Palestine 47: un partage avorté [Palestino 47: divido abortita]*, Complexe, Bruselo, 1987, 1994, 2007.

- *Golfe: clefs pour une guerre annoncée [Golfo: ŝlosiloj por anoncita milito]*, Le Monde Éditions, 1991.

Kun Serge Halimi: *L'Opinion, ça se travaille... Les médias, l'OTAN et la guerre du Kosovo [La opinio prilaborata... Komunikiloj, NATO kaj la Kosovo-milito]*, Agone, Marsejlo, 2000, 2001, 2002 kaj (kun Henri Maler) 2006.

Kun Christine Queralt: *Promenade historique dans Paris [Historia promenado tra Parizo]*, Liana Levi, Parizo, 2005.

Kun Leila Shahid, Michel Warschawski kaj Isabelle Avran:
Les Banlieues, le Proche-Orient et nous [La antaŭurboj, Proksim-Oriento kaj ni], Éditions de l'Atelier, Parizo, 2006.

Kun Èric Venturini: *Portraits de China Town, le ghetto imaginaire [Portretoj de China Town, imagaj portretoj]*, Autrement, Parizo, 1987.

Fotoj de la unua kovrilpaĝo: anonima kliŝo farita en 1948, prenita el la libro de Elias Sanbar, *Palestiniens, la photographie d'une terre et de son peuple de 1893 à nos jours*, Hazan, Parizo, 2004.

Por la franclingva originalo, ĉiuj rajtoj rezervitaj © Les Éditions de l'Atelier, Parizo, 2007, ISBN 978-2-7082-3969-2

Por la Esperanta eldono, prizorgata de Monda Asembleo Socia (MAS), inkluzive de la traduko, © Monda Asembleo Socia (MAS), ĉe Unesko-Grupo Narbonnia, Embres-et-Castelmaure, Francio, 2008

Presita en Germanio

ISBN 978-2-9529537-6-4

**Dominique VIDAL
kun Sébastien BOUSSOIS**

**KIEL ISRAELO ELPELIS LA
PALESTINANOJN**

(1947-1949)

Monda Asembleo Socia (MAS)

*Dankon al Christine Queralt
pro ŝiaj tridek jaroj da zorga kontrollegado.*

Por Marc-Olivier

Por Leila

Antaŭparolo

de Yehuda Lancry¹

En la israela-palestina rilato, esence konflikta, la duba-sorta antaŭpreparado de la paco dankas sian daŭrigon kaj transvivadon nur al la fonda tavolo de la Oslaj Interkonsentoj: la reciproka agnosko. Tiu estas la movoforto, en kunteksto de ofte tragikaj kontraŭdiroj, kiu radikigas la israelan-palestinan dialogon en regionon de neinversigeblo.

Preskaŭ jarcento pasis post la unua Cionisma Kongreso kaj ĝis la subskribo de la Oslaj interkonsentoj, la 13-an de septembro 1993. Jarcento de reciproka neado en kiu regas la milito, kaj ĝiaj rezultoj. Estas certe pro tio, ke palestinaĵoj kaj israelanoj alvenis de tiom malproksime, ke la Oslaj interkonsentoj havas la valoron de geneza evento. En la fulmrapida manpremo de Ichak Rabin, miregigita de la pezo de sia decido, kaj de Jaser Arafat, transformita en eŭforion, la israela-palestina historio sigelas unu el siaj maloftegaj apoteozoj. La fino de perforto kaj la reciproka agnosko estas ĝiaj ĉefelementoj kaj la Princip-Deklaro, kiun la interkonsentoj eldiras, postulas, en sinsekva logiko, intertransiĝo kaj daŭro, la solvon de la konflikto.

Kvankam la interkonsentoj diras neniom pri la certeco alveni al palestina ŝtato, ili donas aliflanke multe pli videblan rolon, en la intertraktado de la definitiva statuso, al la dosiero de la palestinaj rifuĝintoj.

Unuafoje aperas, samrange kiel la divido de Jerusalemo kaj la fina teritoria konfiguraĵo, la demando de la palestinaj rifuĝintoj. Tiu sama kiu, objekto de konstanta laborado de

1 Iama ambasadoro de Israelo en Francio kaj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj.

forgesigo fare de la oficiala historiografio de Israelo, tamen influas kaj hantas la kolektivan subkonscion.

Ĉu vidi, en la enŝovo de tiu zono konstante malpermesita en la esenco mem de la intertraktado de la definitiva statuso, ian efikon de la „nova historio” kaj de unu ties pioniroj, Benny Morris, kiu malfermas, en 1988, la unuajn seriozajn breĉojn en la israela rakontaro pri la eliro de la palestinaĵoj? Nenio elkludas tion, tute male. La interna debato inter la partizanoj de la cionisma ortodoksismo pri la rakonto de la „fuĝo” de la palestinaj rifuĝintoj kaj „reviziismaj” historiistoj, kiuj privilegias la tezon de decidita elpelo, kreas sendube unuavican efikon sur la kanvaso de la forgesigo de la palestina tragedio. La multe pli drastaj analizoj de Ilan Pappé kaj de Avi Šlaim, en la sekvo de Morris, larĝigas la breĉon kaj fajrigas la pulvon inter „malnovuloj” kaj „novuloj”.

Ĝuste tiu potenca prajmo metita de la „novaj historiistoj” sukcesas malmunti la armaĵon de la oficiala rakonto, spite al la ariergardaj bataloj de ties defendantoj. Jen okazas sendube unua gravega paŝo en la agnosko de la Alia, amplifika de la reciproka agnosko de la Oslaj interkonsentoj.

Certe, laŭ la logiko de Oslo, la dosiero de la rifuĝintoj estas postŝovita al la stadio de la definitiva statuso, cetere kiel la aliaj partoj de alta tensio de la konflikt-regulado. Tamen tiu granda subpremata temo revenas, eĉ se nur sur la diskutnivelo. Tiurilate, la fermento de la „novaj historiistoj” verŝajne liberigis ĉe la konceptintoj de la Oslo-interkonsentoj la necesajn energiojn por meti en ĝian tagordon, eĉ postŝovite, demandon kiu profunde dividas historiistojn kaj intelektulojn en Israelo. Ĝuste en tiu rompiĝo, kiu malfermas la israelan konscion al aliaj esploradoj, alireblas bordoj ĝis nun evitataj.

Tiu ĉi eldono de la verko de Dominique Vidal, riĉa je du novaj ĉapitroj pri la movado de la du gvidantoj, Benny Morris kaj Ilan Pappé, kaj je bonega postparolo de Sébastien Boussois, proponas rimarkindan historion de la historioj de Israelo pri la palestinaj rifuĝintoj.

Tiel, por Benny Morris, senigi la cionisman historiografii

on je ĝia unisma pensado sen tamen forlasi la cionismon, montriĝas gravega projekto, eĉ preze de ideologia renversiĝo kontraŭa al lia pionira esplorado, kiun prezentas la freŝdata ĉapitro dediĉita al li.

La laboro kiel esploristo de Ilan Pappé, kaj la politika agado kiun li diras sia, tendencas preterpasi la cionismon, eĉ ĝian abolon kaj anstataŭigon per alia politika projekto - nome dunacia ŝtato.

La opozicio al tiuj du apostoloj siavice faras neniajn nuancojn. Por Anita Šapira, Šabtai Teveth aŭ Aharon Meged, la „novaj historiistoj”, sen ajna nuanco, estas same nigraj kaj laboras por neniigo de Israelo.

Kion diras al ni, al ni israelanoj, portantoj de nia historio, por la daŭro alligita al la fundamentoj de Israelo, de la antikva Israelo ĝis la moderna, tra ĝia dumiljara neniigo, de ĝia ekstermado fare de la nazioj ĝis ĝia renaskiĝo, tiuj novaj voĉoj kiuj rifuzas unu el niaj fondo-rakontoj?

Atakante la ortodoksan version de la naskiĝo de Israelo, tiuj israelaj „novaj historiistoj” anstataŭigas ĝin per reviziita kaj korektita historia versio. La disputo inter malnovaj kaj novaj historiistoj konsistas en la legado, deĉifrado kaj transskribo de la israela-palestina interna milito, poste israela-araba inter 1947 kaj 1949. Por Benny Morris, Avi Šlaim aŭ Ilan Pappé temas, en la movado de la antaŭulo Simha Flapan, eltiri la veron pri la palestina eliro duoble kaŝita sub la pakumo de la oficialaj tezoj. Ilia prilumado efikas akre, perturbas kaj afliktas la oficialan israelan diskurson pri la palestina tragedio.

Sub ilia lumfasko senvualiĝas la realo forŝovita de la cionismo: la renaskiĝo de Israelo kaŭzis nacian katastrofon por la palestinanoj. Kun ilia eliro, la cionismo jam ne povas aperi en sia senpeka koncipado. La renaskiĝo de Israelo, tiel justa en si mem, akiriĝas, parte, surkoste de la palestinanoj. Ĉu A. B. Jehoŝua, maldekstra verkisto kaj arda aktivulo por la israela-araba paco, ne agnoskas moralan rajton de la juda popolo „*alpreni, eĉ perforte, parton de Granda Israelo*”? Sur tiu bazo, ĉu la forto de la morala

rajto, transformita al rajto de la forto, povas pravigi la amasan elpelon kaj ĝiajn ekscesojn kiuj generis certajn masakrojn?

La historio de la palestina elpelo, kiu aperas el kolosa kolektiva psiĥa subpremo, kun helpo de israelaj arĥivoj, aperigas la parton de respondeco de Israelo kaj de ties fondopatroj. Sen ĝenerala nek politika plano de antaŭpensita elpelo, sed kun intenca volo de elpelo kaj de detruo de arabaj vilaĝoj, Israelo subtenis kaj stimulis la amasan eliron, laŭ Benny Morris. Lia kolego Ilan Pappé validigas, dum la polemiko kun la malnovuloj, la tezon de ĝenerala strategio de elpelo, eĉ ideologion de translokado, ĉe David Ben Gurion.

Ĝuste tiun tezon proponas al ni la studaĵo, solide konstruita kaj dokumentita, de Dominique Vidal. La aŭtoro sukcesis la veton, per nerefutebla prezentado de la historiaj faktoj, per brila sintezo de la kontribuaĵoj de la novaj israelaj historiistoj, tre malmulte konataj en Francio. Funde empatia kun la lastatempaj esploroj, la aŭtoro metode transdonas la tezon pri cionista ento superdotita, pli provizita politike kaj milite tuj post sia sendependiĝo ol la araba malamiko gluita al mondo senorganiza kaj neadaptita. Li tamen scias montri sin kritika pri certaj malkoheraĵoj kaj konkludoj de Benny Morris. Krome, kaj en spirito de objektiveco, la aŭtoro donas la parolon al la reprezentantoj de la oficiala cionista historiografio, kun Šabtai Teveth ĉekape.

En tiu disputo de la malnovuloj kaj novuloj temas ankaŭ pri la etoso de Israelo kaj pri ĝia evoluanta identeco. La israela estulo, longan tempon per neceso forĝita sub la minaco de neniigo, devas malfermi sian fondajn rakonton kaj mitojn al la rakonto de la Alia, palestina aŭ araba. En tiu kruciĝo de rakontoj, ilia interpretado, iliaj ŝokoj kaj katarsoj, nemalhaveblaj substancoj de la reciproka agnosko kontraktita en Oslo, devas enskribi sin la parolo de paco kaj de repaciĝo.

Kion instruas al ni la novaj voĉoj, tio estas ke la paco povas neniam alveni en la sistema forkaŝo de la rakonto de la Alia. Por tiuj israelanoj por kiuj daŭrema paco, vivata en

kunezistado kaj ĉefe en la mildigo de la kolektivaj memoroj kaj konscioj de la du popoloj, meritas esti starigita kaj solidigata, tio pasas nepre tra la integrado de la rakontaro de la Alia.

Tiurilate, la „novaj historiistoj”, eĉ per la radikalismo de Ilan Pappé, estas same antaŭesplorantoj de tiu mallumigita regiono de la israela kolektiva konscio kiel preparantoj de pli firma aliĝo al la reciproka agnosko kaj al la paco kun la palestinanoj. Ilia laboro, anstataŭ esti fonto de malutilo por Israelo, estas je la honoro de ilia lando - kaj multe pli: ĝi estas devo, morala devo, mirindega taskiĝo pri liberiga entrepreno kapabla enskribi en la israelan sperton la rompiniojn, la bonfarajn interspacetojn, necesajn por enigo de la diskurso de la Alia. Maniero aparte pedagogia, se juĝi laŭ la ĵusa kaj trafa decido de la ministrino pri Nacia Edukado, Juli Tamir, enkludi la koncepton de Nakba (katastrofo de la palestina eliro) en la lernolibroj de la israelaj arabaj lernantoj. Decido kompletiginda per enigo de la rakonto Nakba en la lernolibroj de la israelaj judaj lernantoj.

La palestinanoj de pragmata tendenco, tiuj kiuj ne aliĝas al la fantasma de la elradikigo de la ŝtato Israelo, tre bone scias tion: la korpa reveno de la palestinaj rifuĝintoj en Israelon estas nepraktikebla. Ĝi povas trovi sian realigon, certe partan kaj frustran, nur en la estonta palestina ŝtato.

Mahmud Abbas (Abu Mazen), la prezidanto de la Palestina Aŭtoritato, partizano de la dialogo kaj moderiganto, multfoje proponis tion en diversaj intervjuoj, aparte al la israela gazetaro. Li, naskita en la urbo Safed, israela civito ekde la sendependeco kaj juda spirita historia loko jam en la antikveco, vizitinte sian naskiĝurbon post la subskribo de la Oslaj interkonsentoj, dolore kaj sincere konstatis la neebulon de sia simpla reveno al Safed. Tamen, Abbas, kiel liaj politikaj kaj ideologiaj kamaradoj, postulas, transe de intertraktita solvo de la rifuĝinto-demando, la agnoskon de la rajto reveni.

Kiel la „novaj historiistoj”, kaj preter certaj iliaj konkludoj diskuteblaj kaj diskutataj, Israelo povus, sen cedi pri sia ri

fuzo de la reveno de la rifuĝintoj nome de sia transvivado kiel juda ŝtato, aliĝi al la rekono, sur historia nivelo, de la eliro de la palestinanoj kaj de sia parto de respondeco en tiu eliro.

Agi tiel estus doni sencon kaj enhavon al la reciproka agnosko kontraktita en Oslo.

Kaj poste, kion oni povas konkrete fari? La definitiva difino de la limoj inter Israelo kaj la palestina ŝtato ebligus al la palestinanoj disponi pri la tre granda plimulto de la israelaj kolonioj en Cisjordanio. Etaj, mezaj aŭ grandaj, ili konsistigas gravan urban strukturon, kiun la palestinanoj, kun la helpo de la internacia komunumo kaj tiu de Israelo, povus grandigi kaj adapti al siaj bezonoj. Post kelka tempo, centmiloj da rifuĝintoj povus disponi pri ili.

Miavice mi konstante pledis, inkluzive dum la katastrofa unuflanka praktiko en Gazao destinita sensubstancigi la palestinan partneron, por transdono de la kolonioj, post ilia evakuado, al la palestinanoj.

Prefere ol detrui ilin en ruiniga rabio, kaj fari ilin - kiel Jamit en Sinajo - monumentoj je ruinigo de la okupinto, necesas cedi ilin al la palestinanoj. Trans ĝia konkreta aspekto, tiu dispono, kiun mi evitas nomi larĝanima ĉar estas nenio larĝanima en tiu formo de parta kompenso por tiuj kiuj rajtas ĝin, entenas unuarangan simbolan ŝarĝon.

La palestinano, daŭre en stato de ardanta revado pri siaj perditaj urboj de Palestino (do ankaŭ en Israelo), povus almenaŭ alproprigi la koloniojn en palestina teritorio kaj, farante tion, aboli unu el la vektoroj kaj gravaj simboloj de lia fremdigo. Aliflanke, estos tiam la israela evakuito reheimigito kiu fiksos sian rigardon, por la daŭro, sur siaj iamaj civitoj en tio kio estis Judio-Samario. Ĝuste en tiu krucita revado, en tiu macerado de la konscioj kapabla generi maturiĝon de la kolektivaj memoroj, oni povas semi la grajnoj de repaciĝo. Estas tiuj civitoj de malpaco, fariĝintaj kolektuoj de rehonoriĝo, kiuj agos konstante kiel resoniloj de la plureca recitado de la israela-palestina paco.

De unu divido al alia

**La israela-araba milito (de 15-a de majo 1948 ĝis 20-a
de julio 1949)**

Glosareto de la jaroj 1949

Abdallah, Ibn bin Hussein (1882-1951): Filo de la ŝerifo Hussein de Mekko, metita de la britoj en 1921 ĉe la kapo de la Emirlando Transjordanio, li fariĝas reĝo dum la formala sendependiĝo de la lando, en 1946. Revante regi „grandan Sirion” kiu entenu Palestinon, li intertraktas sekrete kun la cionistaj gvidantoj por malhelpi la naskiĝon de palestina ŝtato kaj akapari Cisjordanion, kiun li efektive aneksas en 1950. La sekvan jaron li mortis murdite ĉe la enirejo de la moskeo Al-Aksa de Jerusalemo fare de palestinano proksima de la granda muftio de Jerusalemo, Hadĵ Muhammad Amin Al-Husseini.

Juda Agentejo: Disponita de la artikolo 4 de la brita mandato pri Palestino, la Juda Agentejo estis kreita nur en 1929. Ĝi gvidas la judan komunumon de Palestino kaj reprezentas ĝin ĉe la mandataj aŭtoritatoj. Iom post iom kun la batalo por starigo de juda ŝtato en Palestino, ĝi fariĝas por la judoj de la lando ia registaro antaŭ la ŝtatfondo.

Agudat Israel: Ortodoksa religia juda partio, ne cionisma.

Alia: De la hebrea „altiĝo”, signifas la enmigradon de judoj en Palestinon.

Begin (Menahem) (1913-1992): Iama ĉefo de la Betar - la junular-organizaĵo de la estrem-dekstra cionisma movado, nomata „reviziisma” - en Pollando, ĉefo de la Irgun en Palestino, poste fondanto de la partio Herut. Li fariĝis ĉefministro en 1977.

Ben Gurion (David), naskita David Grin (1886-1973): Ĝenerala sekretario de la Mapai, li aliras en 1935 la prezidantecon de la Cionista Ekzekutivo kaj de la Juda Agentejo.

Kiel tia, li gvidas, post la milito, la politikan, diplomatian kaj militan politikon por la sendependeco de la ŝtato Israelo. Post la proklamo de tiu, li plenumas samtempe la funkciojn de ĉefministro kaj tiujn de ministro pri defendo, gvidante aparte la operaciojn kontraŭ la palestinanoj kaj la armitaj fortoj de la arabaj ŝtatoj.

Bevin (Ernest) (1881-1951): Sekretario de la Brita Foreign Office de 1945 ĝis 1951, li decidas kaj realigas, post lastaj provoj konservi ĝin, la forlason, fare de Britio, de ĝia mandato pri Palestino.

Juda Nacia Fonduso: En la hebrea Keren Kajemet, ĝi estas la organismo taskita pri aĉeto de teroj en Palestino.

Hagana: De la hebrea „defendo”, signas la ĉefan judan armeon (kontraŭleĝa) antaŭ la starigo de la Defendo-Fortoj de Israelo (Cahal) fine de majo 1948.

Araba Alta Komitato (AAK): Animanto de la granda palestina ribelo de 1936-1939, malpermesata en 1937, tiu komitato estas reaktivigita de la Araba Ligo en 1946. La prezidanteco estas rezervita al Hadĵ Muhammad Amin Al-Husseini, tiam en ekzilo, sed ties proksimuloj regas ĝian gvidadon.

Husseini (Hadĵ Muhammad Amin Al-) (1893?-1974): Post partopreni en la Araba Ribelo de 1917-1918 kontraŭ la turkoj, li aktivas en la naciismaj organizoj. Fariĝinte granda muftio de Jerusalemo en 1921, li gvidas la palestinan ribelon de 1936-1939 kaj alprenas nature la direktojn de la Araba Alta Komitato post la Dua Mondmilito, dum kiu li trovis rifuĝejon en Berlino kaj kontribuis al starigo de divizioj de la Waffen-SS konsistantaj esence el bosnia-kroataj islamanoj. Nomumita de la Araba Ligo ĉekape de la Alta Araba Komitato (palestina), li provas ludi - el Egiptio, kien li estas rifuĝinta - rolon en la bataloj de 1948-1949. Post la malvenko li kreas en Gazao la Registaron de Tuta Palestino.

Irgun: Starigita en Pollando de Vladimir Zeev Jabotinsky, la fondinto kaj ĉefo de la faŝismema cionista tendenco, nomata „reviziisma”, la Nacia Milita Organizo (Irgun Zvai Leumi) famiĝis pro la sistema uzado de terorismo, same en la

la batalo kontraŭ la britoj kiel en la batalo kontraŭ la araboj. Ĝiaj milicoj havas nome, kun tiuj de la Lehi, la respondecon pri la atencoj kontraŭ la hotelo King David de Jerusalemo kaj pri la masakro de la vilaĝo Deir Jassin. De la Irgun naskiĝis, en aŭgusto 1948, la partio Herut, koro de la nuna Likud.

Kibuco: Organizitaj laŭ la kolektivismaj principoj, tiuj kampkulturaj komunumoj ludis decidan rolon en la ekspansio de la juda komunumo de Palestino.

Knesset: Nomo de la sola ĉambro de la israela parlamento.

Araba Ligo: Gvidata de Sir John Bagot Glubb (Paŝa) ekde 1939, tiu armea organizaĵo fariĝis en 1946, kun proksimume 10.000 homoj, la regula armeo de Transjordanio. Sed ĝia financado, ĝia ekipado kaj kadrigo restas larĝe britaj.

Lehi: Disidento de la Irgun, al kiu li riproĉas observi, ekde 1940, batalhalton en la luktado kontraŭ la britoj, Abraham Stern fondas la Lehi, kuntiriĝo de Lohamei Herut Israel (Batalantoj de la libereco de Israelo, en la hebrea). Tiuj rekomencas la armitan batalon multigante la atencojn, ekzekutojn kaj mon-ĉantaĝoj. Stern igas la organizaĵon eĉ kontakti, dum la vintro 1940-1941, la naziojn, al kiuj ĝi proponas aliancon en oficiala formo - pro la diro laŭ kiu la malamikoj (la germanoj) de niaj malamikoj (la britoj) estas niaj amikoj. Post la morto de ĝia fondinto en februaro 1942, la Lehi estas gvidata de eksterleĝa triopo, kies unu membro estas Ichak Ŝamir, kaj lanĉas sin en senkompatan terorismoon kontraŭ la okupanto, poste kontraŭ la araboj de Palestino: la grupo famiĝis nome dum la masakro de la vilaĝo Deir Jassin kaj dum la murdo al la duko Folke Bernadotte - tiu lasta „armitaĵo” kondukas al ĝia malpermeso.

Araba Ligo: Naskita la 22-an de marto 1945 en Aleksandrio, la Ligo de la Arabaj Ŝtatoj entenas komence Egiption, Irakon, Libanon, Saud-Arabion, Sirion, Transjordanion kaj (Nordan) Jemenon. La egipta reĝimo iniciatis la starigon por kontraŭagi la manovrojn de Britio kaj de ties haŝemitaj aliancanoj de Amano kaj de Bagdado, kiuj tiam provas star-

igi Unuiĝintan Ŝtaton de la „Fertila Kreskanto” (aŭ Grandan Sirion) kiu entenu Palestinon kaj Sirion. La Ligo montriĝis nekapabla superi la dividojn inter siaj membroŝtatoj, ĉefe pri la palestina demando.

Mapai: Naskita en 1929 el la fuzio de la ĉefaj socialistaj cionistaj grupoj kaj gvidata de David Ben Gurion, la Partio de la Laboristoj de la Lando Israelo akiris kreskantan influon ĝis 1944, kiam ĝi ricevis preskaŭ 60 % de la voĉoj de la juda komunumo de Palestino. Ĝi fariĝis la gvida forto de la israelaj registaroj ĝis 1977.

Mapam: Marksismema partio, naskita el la fuzio, en januaro 1948, de la du ĉefaj cionismaj grupoj situantaj maldekstre de la Mapai, la marksisma Hachomer Hacair (La juna gardisto) kaj la movado grupigante la Ahdut Haavoda (Unio de la Laboro) kaj la porsovetian Poale Sion Smone (Laboristoj de Maldekstra Cion).

Meir (Golda), naskita Meyerson (1898-1978): Gvidantino de la Mapai, ŝi anstataŭas Moshe Sharett, arestita de la britoj en 1946, ĉekape de la Politika Departemento de la Juda Agentejo. Ŝi reprezentis ankaŭ tiun, retenata en la Unuiĝintaj Nacioj, dum la renkontiĝo de la 17-a de novembro 1947 okaze de kiu ŝi atingis sekretan interkonsenton kun la reĝo Abdallah: interŝanĝe de lia ne-interveno kontraŭ la naskota juda ŝtato, Transjordanio ricevos la ĉefan parton de Cisjordanio. Golda Meir tiam ĵus vojaĝis al Moskvo, kie ŝi fariĝis la unua ambasadoro de Israelo. Ŝi gvidis la israelan registaron de 1969 ĝis 1974.

Mossad: Taskita pri la eksterleĝa enmigrado de la judoj al Palestino, la Mossad Alia Bet (Organizaĵo de la dua altiĝo, en la hebrea) luas boatojn kiuj alportas, inter 1945 kaj majo 1948, 69.800 judojn, de kiuj 51.500 estas kaptitaj kaj deportitaj de la britoj al Kipro. Tiu termino signis poste la eksterajn informservojn de Israelo.

Nakba: En la araba „katastrofo”, termino uzata de la araboj por priskribi la eventojn de 1947-1949 en Palestino.

Palmah: Kuntiraĵo de Pelugot Mahac (Sturm-Brigadoj, en

la hebrea), signas la elitajn fortojn kiuj batalis flanke de la Hagana kaj situis en la ideologia tendenco de la diversaj komponantoj de la Mapam, nome de la Ahdut Haavoda.

Qawuĝi (Fawzi Al-) (1890-1976): Partopreninta en la druzo-ribelo de Sirio (1925-1927), tiu siria-libana soldato rekrutis, en 1936, multajn volontulojn, ĉefe siriajn kaj irakajn, por subteni la Araban Ribelon de Palestino. En la sama spirito li kunigas proksimume mil homojn, formas la Armeon nomatan de Liberigo, kies gvidadon li alprenis kaj kiun li kondukas en Palestinon, ekde januaro 1948, por apogi la araban gerilon. Liaj lastaj trupoj estis repuŝitaj al Suda Libano de la israela armeo. La palestinanoj memoras multajn de ĝiaj homoj kiel ŝtelistojn, seksperfortulojn kaj murdistojn.

Rabin (Ichak) (1922-1995): Membro de la Palmah ekde 1940, li komandas, dum la milito de 1948-1949, la brigadon Harel ĉe la fronto de Jerusalemo. En tiu ofico li gvidas, la 12-an de julio 1948, la elpelon de la araba loĝantaro de Lid-da kaj de Ramleh. Li partoprenis poste, en Rhodes, en la intertraktado pri la israela-egipta interkonsento pri batalhalto. Li estis la ĉefministro de Israelo de 1974 ĝis 1977, poste denove de 1992 ĝis sia murdo, la 4-a de novembro 1995.

Ŝamir (Jichak), naskita Yzernitzky (1915-): Fidelulo de Abraham Stern ĉekape de la disidenta reviziisma grupo, li fariĝis unu el la tri respondeculoj de la Lehi post la morto de Abraham Stern. Ŝamir estis ĉekape de la israela registaro de 1983 ĝis 1984, poste de 1986 ĝis 1992.

Sharett (Moshe), naskita Shertok (1894-1965): Posteulo de Haim Arlozoroff, murdita en 1933, ĉekape de la Politika Departemento de la Juda Agentejo, li estis la unua ministro pri Eksterlandaj Aferoj de Israelo antaŭ ol akiri la funkcion de ĉefministro (1954-1956).

UNSCOP: Nomumita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj en aprilo 1947, la United Nations Special Committee on Palestine enketas surloke dum la somero 1948 kaj donas sian raporton la 31-an de aŭgusto. Ĝi proponas la dividon de Palestino en du ŝtatojn, unu judan kaj la alian araban, krom internacian zonon por Jerusalemo kaj la

sanktejoj. La Ĝenerala Asembleo adoptis tiun proponon la 29-an de novembro 1947.

Weizmann (Haim) (1874-1952): Modera cionisto, partizano de la kunlaborado kun Londono - de kiu li akiris, en 1917, la Balfour-Deklaron -, li prezidis la Cionistan Organizon de 1920 ĝis 1948 preskaŭ seninterrompe antaŭ ol fariĝi la unua ŝtatestro de Israelo.

Jiŝuf: Nomo donita al la juda komunumo de Palestino antaŭ la starigo de la ŝtato Israelo.

Mallonga kronologio

1947-1949

1947

18-a de februaro: La brita ministro pri eksterlandaj aferoj, Ernest Bevin, anoncas al la Ĉambro de Deputitoj ke Londono „*submetos* [la palestinan demandon] *al la juĝo de la Unuiĝintaj Nacioj*”.

1-a de marto: Taĉment-atakoj de la Irgun kontraŭ dek-kvino da britaj aremaj celoj.

28-a de aprilo: Malfermo en Novjorko de la eksterordinara sesio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Palestino. Ĝi decidas krei enket-komisionon, la UNSCOP.

4-a de majo: La Irgun atakas la prizonon de Sankta-Johano-de-Akro kaj liberigas plurcentojn da cionistaj aktivuloj malliberigitaj de la britoj.

14-a de majo: Antaŭ la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, la sovetiano Andrej Gromiko rekomendas la starigon en Palestino de „*unuiĝinta juda-araba ŝtato*”, sed konsideras, en kazo de alfrontiĝoj, „*la dividon de tiu landoj en du ŝtatojn*”.

3-a de junio: Londono anoncas sian planon de divido de Hindio.

5-a de junio: Publikigo de la Marshall-plano.

Junio-julio: Enketo de la Unscop en Palestino (kaj en la tendaroj de la delokituloj - DP), bojkotata de la Araba Alta Komitato (palestina).

12-a de julio: La Irgun forkondukas du britajn serĝentojn, kiujn ĝi minacas ekzekuti.

18-a de julio: La ŝipo *Exodus*, kun siaj 4.500 okupantoj, estas ŝipkontrolata de la Royal Navy, en la maro antaŭ Gazao. La pasaĝeroj devas veturi al Port-de-Bouc, kiun ili atingas la 29-an de julio, antaŭ ol elŝipiĝi en Hamburgo la 8-an de septembro.

31-a de julio: La Irgun murdas siajn du ostaĝojn.

31-a de aŭgusto: La UNSCOP submetas sian raporton en kiu la plimulto de ĝiaj membroj esprimas sin por divido.

26-a de septembro: Britio anoncas ke ĝi retiros sin el Palestino.

5-a de oktobro: Starigo de la Kominform, dum la interna milito en Grekio etendiĝas.

7-a ĝis 15-a de oktobro: Kunveno de la Konsilio de la Araba Ligo en Alejo (Libano). Por la unua fojo milita interveno en Palestino estas konsiderata.

17-a de novembro: Dum sekreta interparolado, la reĝo Abdallah kaj Golda Meyerson (anstataŭanto de Moshe Shertok, ĉefo de la politika departemento de la Juda Agentejo retenata en Novjorko de la diplomatia batalo sine de la Unuiĝintaj Nacioj), konsideras kroman dividon - anstataŭ formi la koron de la planita araba ŝtato, Cisjordanio estu aneksota de Transjordanio.

29-a de novembro: La Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj adoptas, per plimulto de du trionoj, la rezolucion 181 kiu dividas Palestinon en du ŝtatojn, unu judan kaj la alian araban, krome internacian zonon kun Jerusalemo kaj la sanktejoj. Britio anoncas ke ĝi ne kunlaboros por la aplikado de tiu plano kaj ke ĝi konservos ĉiujn siajn povojn ĝis la fino de la mandato fiksita de ĝi por la 15-a de majo.

30-a de novembro: La sep unuaj mortintoj de la milito de 1947-1949 falas en Palestino.

1-a de decembro: Unua kontrakto pri vendo de armiloj

subskribita de la Hagana kun Ĉeĥoslovakio.

5-a de decembro: Vaŝingtono dekretas embargon de armiloj al la Proksim-Oriento.

11-a de decembro: La juda kvartalo de Jerusalemo estas tranĉita de Transjordanio fare de la Araba Ligo.

15-a de decembro: Du semajnojn post la adopto de la divido-plano, oni nombras jam 160 mortviktimojn en Palestino, plejmulte arabajn.

1948

8-a de januaro: 1.500 arabaj volontuloj de la Armeo nomata de Liberigo Fawzi Al-Qawuĝi penetras en Palestinon - ili estos 3.800 la 14-an de majo.

15-a de januaro: Subskribo de alianc-traktato inter Londono kaj Bagdado. Perfortaj ribeloj en Irako malhelpas ties ratifon.

22-a de januaro: Blendita konvojo de la Hagana falas en la manojn de arabaj partizanoj, kiuj mortigas ĉiujn okupantojn.

25-a de februaro: „Praga puĉo”

Fine de februaro: Laŭ la UN, la bataloj en Palestino faris jam 869 mortviktimojn kaj 1909 vunditojn. Kaj la enketoj indikas ke la usona opinio, ĝis tiam favora al divido, plimulte rifuzas ĝin.

8-a de marto: Harry Truman anoncas sian kandidatiĝon por dua prezidant-mandato.

15-a de marto: Nova alianc-traktato inter Jordanio kaj Britio.

19-a de marto: La usona reprezentanto ĉe la Sekurec-Konsilio de la UN proponas anstataŭigi la divido-planon per internacia „kuratoreco”. Londono, malkonsenta, tamen ankaŭ serĉas rimedon por malhelpi la aplikadon de la rezolucio de la 29-a de novembro 1947.

Fine de marto: Konforme al la interkonsento komencita en decembro 1947 kaj ratifita en januaro 1948 en Novjorko, de Andrej Gromiko kaj Moshe Shertok, la unuaj ĉeĥoslovakaj armiloj alvenas en Palestino. La juda kontraŭofensivo povas komenci, per la operacio Nahșon kaj la plano Dalet.

9-a de aprilo: Masakro de Deir Jassin. Morto de la palestina ĉefo Abdel Kader Al-Husseini en la bataloj por la preno de Castal. La vojo de Jerusalemo estas provizore - remalfermita por la judoj.

13-a de aprilo: La atako al juda konvojo veturanta al la monto Skopus faras 77 mortviktimojn.

18-a de aprilo: La Hagana ekokupas Tiberiadon; la 22-an ĝi prenas Hajfon.

10-a de majo: La judaj trupoj konkeras Safed kaj, la 13-an de majo, Jaffon.

12-a de majo: Harry Truman postulas de Moshe Shertok, kiu estis fariĝonta ministro pri eksterlandaj aferoj, ke la Juda Alianco rezignu proklami la sendependecon de Israelo. Sed, antaŭe, li sciigis al la estonta prezidanto Haim Weizmann... ke li agnoskos la judan ŝtaton.

14-a de majo: Fino de la brita mandato kaj proklamo de la ŝtato Israelo. Usono agnoskas *fakte* la novan ŝtaton. La armeoj de la kvin arabaj landoj eniras sekvatage en Palestanon.

17-a de majo: La USSR agnoskas *jure* Israelon. La Hagana konkeras Sankta-Johanon-de-Arko. Sekvatage la egiptoj prenas Beerșebon.

20-a de majo: La sveda duko Folke Bernadotte estas nomumita peranto de la Unuiĝintaj Nacioj.

28-a de majo: La juda kvartalo de malnova Jerusalemo kapitulacas.

29-a de majo: La egipta ofensivo estas haltigita en Isdud (estonta Așdod).

31-a de majo: Naskiĝo de la „Defendo-Fortoj de Israelo”

(Cahal), kiu fuziigas la Hagana, la Palmah kaj - teorie - la milicoj de la Irgun kaj de la Lehi.

11-a de junio ĝis 8-a de julio: Unua israela-araba batalhalto.

20-a ĝis 22-a de junio: Krizo de la *Altalena* - la Hagana sinkigas, per pafoj de obusoj, tiun ŝipon luatan de la Irgun por provizi sin unuflanke per armiloj, dum la milicanoj de la organizo, kiel tiuj de la Lehi, devus aliĝi al la Defendo-Fortoj de Israelo starigitajn tri semajnojn antaŭe.

23-a de junio: Komenco de la blokado de Berlino.

28-a de junio: Unua plano Bernadotte.

9-a ĝis 18-a de julio: „Dektaga milito”. Israelo konkeras Liddon, Ramlehon kaj Nazareton.

17-a de septembro: Murdo de la duko Bernadotte fare de ekstremisma taĉmento. Tri tagojn poste, la registaro de Tel-Avivo malfondas la Lehi kaj la Irgun, konsideratajn respondecaj.

23-a de septembro: Starigo de la Araba Registaro por tuta Palestino agnoskita de ĉiuj arabaj ŝtatoj, escepte de Transjordanio.

2-a de oktobro: Kunveno en Amano de Palestina Kongreso kiu proklamas sian fidelecon al la reĝo Abdallah de Transjordanio.

15-a de oktobro: Cahal rompas la batalhalton kaj atakas en la dezerto Negevo. La operacio Joav daŭras ĝis la 22-a.

29-a ĝis 31-a de oktobro: La operacio Hiram ebligas al Cahal forpeli la Armeon de Liberigo de Galileo.

Novembro: Harry Truman estas reelektita prezidanto de Usono.

1-a de decembro: Kunveninte en Jeriĥo, la nova Palestina Kongreso, prezidata de Mohamed Al-Jaabari, postulas la aneksadon de Palestino al la haŝemita reĝlando.

11-a de decembro: La Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝ-

intaj Nacioj esprimas sin por la rajto je reveno de la arabaj rifuĝintoj kaj reasertas la internacian statuson de Jerusalemo kaj ĝian regadon de la Unuiĝintaj Nacioj.

17-a de decembro: La UN rifuzas la aliĝon de Israelo.

22-a de decembro: Rekomenco de la bataloj inter Egipto kaj Israelo, kiu konkeras la plej grandan parton de la Negevo.

28-a de decembro: Murdo de la egipta ĉefministro Nok-raĉi Paŝa fare de studento ligita kun la Islamaj Fratoj.

1949

7-a de januaro: Minacata de rekta interveno de la britaj fortoj, Cahal forlasas la nordon de Sinajo.

25-a de januaro: Elektoj al la israela Konstituciiga Asembleo.

24-a de februaro: Subskribo en Rhodes de interkonsento pri batalhalto inter Egiptio kaj Israelo.

10-a de marto: La israelaj trupoj rapidas al al Ruĝa Maro kaj ekokupas la vilaĝon Umm Raŝraŝ - la estonta Ejlat.

23-a de marto: Israela-libana batalhalto.

30-a de marto: Unua puĉo en Sirio kiu komencas serion da skuegoj en araba mondo skuata de la malvenko.

3-a de aprilo: Jordania-israela batalhalto.

11-a de majo: Israelo estas akceptita en la sino de la Unuiĝintaj Nacioj.

12-a de majo: Subskribo, fare de Israelo kaj la arabaj ŝtatoj, de la protokoloj de la konferenco de Laŭzano, organizita de la Repaciga Komisiono pri Palestino de la Unuiĝintaj Nacioj.

20-a de julio: Siria-israela konvencio pri batalhalto.

- 29 -

8-a de decembro: Starigo de la Oficejo de Helpo kaj Laboroj de la Unuiĝintaj Nacioj por la Palestinaj Rifuĝintoj (UNRWA).

ENKONDUKO

„Nur kelkiuj admiras ke la historio de reveno, de elaĉeto kaj de liberigo de iliaj patroj estis ankaŭ historio de konkero, de delokadoj, de subpremo kaj de morto.”

Yaron Ezrachi, Rubber Bullets

Inter la plano de divido de Palestino adoptita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj la 29-an de novembro 1947 kaj la batalhaltoj de 1949 sekve al la unua israela-araba milito komencita per la invado de la 15-a de majo 1948, plurcent miloj da palestinanoj, kiu vivis sur la teritorioj fine okupataj de Israelo, forlasis siajn hejmojn.

Por la palestinaj kaj arabaj historiistoj temas tute klare ili ĉiam asertis tion – pri elpelo. La grandega plimulto de la rifuĝintoj (taksataj inter 700.000 ĝis 900.000) estis, klarigas ili, devigataj foriri dum la israelaj-palestinaj alfrontiĝoj, poste dum la israela-araba milito, en la kadro de politika-milita plano de elpelado signata de multnombraj masakroj. Tiu estas nome la tezo defendata, ekde 1961, de Walid Khalidi, en sia eseo titolita Plan Dalet: *Master Plan for the Conquest of Palestine*¹ kaj, pli lastatempe, de Elias Sanbar, en *Palestine 1948. L'Expulsion*².

Laŭ la tradicia israela historiografio, male, la rifuĝintoj (500.000 maksimume) plejparte fuĝis libervole, sekvante la alvokojn de gvidantoj kiuj promesis al ili rapidan revenon post la venko. Por la defendantoj de tiu tezo, ne nur la res-

1 En *Middle East Forum*, novembro 1961, republikigita kun nova komento de la *Journal of Palestine Studies*, vol. 18, n-ro 69, 1988.

2 La libroj de la *Revue d'études palestiniennes*, Parizo, 1984.

pondeculoj de la Juda Agentejo, poste de la israela registaro ne nur ne estis planintaj elpelon, sed la bedaŭrindaj malloftegaj masakroj – unuavice tiu de Deir Jassin, la 9-an de aprilo 1948 – estis la faro nur de la ekstremismaj trupoj ligitaj kun la Irgun de Menahem Begin kaj kun la Lehi de Ichak Ŝamir.

Ekde la 1950-aj jaroj, tamen, kelkaj israelaj eminentuloj ligitaj kun la komunista movado, eĉ kun iuj rondoj de la cionista maldekstro (nome la Mapam), kontestis tiun version. Ekde la dua duono de la 1980-aj jaroj aliĝis al ilia kritiko, interne de la israela universitata sistemo mem, certa nombro da esploristoj, kiuj difinis sin mem „novaj historiistoj”: Simha Flapan, Tom Segev, Avi Schlaim, Ilan Pappé kaj Benny Morris – tiu lasta, per sia libro *The Birth of the Palestinian Refugee Problem, 1947-1949*, donis la signalon por skandalo.³ Ĉar, trans iliaj malsamaj temoj, metodoj kaj opinioj, tio kio unuigas tiujn intelektulojn, estas ke ili atakas la mitojn de la historio de Israelo⁴ kaj revizias aparte tiun pri la

3 Iliaj plej gravaj libroj estas: Simha Flapan, *The Birth of Israel, Myth and Realities*, Panthéon Books, Novjorko, 1987; Tom Segev, 1949. *The First Israelis*, Free Press MacMillan, Novjorko, Londono, 1986; Avi Schlaim, *Collusion across the Jordan King Abdallah, the Zionist Movement and the Partition of Palestine*, Clarendon Press, Oksfordo, 1988; Ilan Pappé, *Britain and the Arab Israeli Conflict, 1948-1951*, MacMillan, Novjorko, 1988, kaj *The Making of the Arab Israeli Conflict, 1947-1951*, I. B. Tauris, Novjorko, 1992; KAJ Benny Morris, *The Birth of the Palestinian Refugee Problem, 1947-1949*, Cambridge University Press, Kambriĝo, 1987, kaj *1948 and After. Israel and the Palestinians*, Clarendon Press, Oksfordo, 1990.

4 La kritiko kompreneble ne limiĝas al la unua israela-araba milito, ĝi tuŝas ankaŭ la sintenon de la cionista gvidantaro fronte al la genocido (kun aparte *The Seventh Million* de Tom Segev, tradukita francen ĉe Liana Levi en 1992), eĉ la econ de la juda koloniado en la epoko de la brita mandato. Same, Benny Morris daŭrigis sian esploradon de la arĥivoj por montri la israelan ekspansiismon en la 1950-aj jaroj (*Israel's Border Wars: Arab Infiltration, Israeli Retaliation and the Countdown to the Suez War*, Clarendon Press, Oksfordo, 1993). Ĝi etendiĝas ankaŭ al aliaj fakoj ol historio, unuavice al sociologio, kun aparte la de-

unua israela-araba milito, kaj tiel kontribuas starigi la veron pri la eliro de la palestinanoj – almenaŭ parte, ni vidos. Ĉiukaze sufiĉe por altiri sur si la koleregon de la ortodoksaj historiistoj kiuj klopodis por meti barojn al ili.⁵

Dudek jarojn poste, kiel aprezi la rolon luditan de la laboraĵoj de tiuj historiistoj kaj la debatojn kiujn ili kaŭzis en la israela socio? Se ilia klarvida rigardo al la naskokondiĉoj de la ŝtato Israelo akompanis la kreskon de la pacismaj ideoj kaj movado dum la tutaj 1980-a kaj 1990-a jardekoj, ĉu ĝi transvivis la duan intifadon kaj ties subpremon, la militan rekonkeron de Cisjordanio kaj la unuflankan retiriĝon el Gazao, do, la israelan-palestinan sakstraton? Por respondi al tiu demando, Sébastien Boussois, aŭtoro de studaĵo dediĉita al la influo de la nova historio al la israela socio, demandis, en junio 2007, Benny Morris, Ilan Pappé, Avi Shlaim, Shlomo Sand kaj Idith Zertal, sed ankaŭ iliajn kritikantojn Tuvia Friling, Anita Shapira, Elhanan Yakira kaj David Tal, kaj ĵurnalistojn, intelektulojn kaj aktivecojn de la juda-araba kunekzistado kiel Michel Warschawski, Gadi Algazi, Shlomo Swirsky, Akiva Eldar, Gideon Levy kaj Amnon Raz-Krakotzkin: la leganto trovos, kiel postparolo de tiu ĉi libro, sintezon de tiuj interparoladoj.

Retrorigarde estas ĉiukaze klare ke la ĉefa stimulo de la „novaj historiistoj” estis la malfermo de la israelaj arĥivoj, publikaj kaj privataj, koncernantaj tiun periodon, kie la esploristoj ĉerpas la esencan parton de siaj fontoj. Tio estas cetere samtempe ilia forto kaj ilia malforto: ili ŝajnas preskaŭ komplete ignori la arĥivojn de la arabaj ŝtatoj, estas vere ne tre alireblajn, same kiel la parolan memoron de la palestinanoj, kiun aliaj tamen ŝatas kolekti. Nu, kiel notas prave la palestina historiisto Nur Masalha, *„la historio kaj la historiografio ne estu nepre verkitaj, ekskluzive aŭ esence,*

mando de la spaco de la orientaj judoj en la israela socio, de la komenco ĝis hodiaŭ. . .

- 5 Vd nome SHABTAI Teveth, „The Palestinian Refugee Problem and its Origins”, *Middle Eastern Studies*, vo. 26, n-ro 2, 1990, kaj Ephraim Karsh, *Fabricating Israeli History. The „New Historians”*, Frank Cass. Londono, 1997.

de la venkintoj".⁶

Sed la studado de la israelaj arĥivoj sendube ne estintus tiom fruktodona, se la dek jaroj post ilia disponigo ne estis aparte stampitaj de la Libano-milito kaj la komenco de la Intifado, kiuj akriĝas, en Israelo mem, la disecon de la naciisma tendaro kaj la pac-tendaro. Mallonge, la „novaj historiistoj” aperigas la devenon de la palestina problemo en la sama momento en kiu tiu alvenas sur la unuan planon kaj estigas novajn solvojn – la 15-an de novembro 1988, la Palestina Nacia Konsili proklamis la palestinan ŝtaton, agnoskis Israelon kaj kondamnis la terorismon.

En artikolo de la *Revue d'études palestiniennes*⁷, unu el la pioniroj de tiu reviziado de la israela historio, Ilan Pappé, metas la akcenton sur la rolon de la israela-palestina dialogo komencita tiam, „*faratan esence*, precizigas li, *sub gvido de la universitataĵoj*. Kvankam ŝajnas mirige, estas pro tiu dialogo ke la plej multaj israelaj esploristoj laborantaj pri la historio de sia lando kaj kiuj ne estis ligitaj kun radikalaj politikaj grupoj eksciis pri la historia versio de siaj palestinaj kolegoj. Multaj de ili rimarkis, okaze de tiu renkontiĝo, la realan valoron de la universitataj laboraĵoj ĝis tiam konsiderataj kiel pura propagando. Certaj ĉapitroj malplaĉaj, eĉ ŝokaj, de la israela historio estis malkovritaj. Sed, pli ol io alia, la israelaj esploristoj ekkonsciis pri la fundamenta kontraŭdiro inter cionistaj naciaj ambicioj kaj ilia realigo surkos-
te de la loka loĝantaro de Palestino”.

Ni aldonu ke la manipulado de la historio kun politikaj celoj ne estas israela ekskluzivaĵo: ĝi plej ofte kuniras kun naciismo. Sed ofte la novaj generacioj, ie kaj tie kaj diversgrade, distanciĝis de ideologia falsado de la pasinteco. Tiel la entrepreno de la „novaj historiistoj” kaj la eĥo kiun ili ricevis spegulas pli „laikan” sintenon de la israela socio, kiel

6 Nur Masalha, „1948 and After revisited”, en *Journal of Palestine Studies* 96, vol. 24, n-ro 4, somero 1995.

7 Ilan Pappé, „La critique post-sioniste en Israël” en *La Revue d'études palestiniennes*, n-ro 12, somero 1997.

multaj aliaj, koncerne sian historion.

Kuraĝo: jen la vorto taŭga por kvalifiki la engaĝiĝon de la israelaj „novaj historiistoj”, preter la debato kiun vekas la laboraĵoj kaj la kritikoj kiujn ili kaŭzas – la aŭtoro permesas

al si formuli kelkajn da ili, aparte en la ĉapitro 8 de tiu ĉi libro. Ĉar ili kontribuis starigi la veron ne pri ia ajn paĝo de la historio. Ne, kio estas nudigita, tio estas ĝuste, por repreni la esprimon de la ortodoksa historiisto Shabtai Teveth, la „*prapeko*” de Israelo. Ĉu la rajto de la supervivantoj de la hitlera popolekstermo, vivi en sekureco en ŝtato, devis ekskludi tiun de la gefiloj de Palestino vivi, ankaŭ ili, en paco en sia ŝtato? Sesdek jarojn poste estas pli ol urĝa tempo ĉesigi tiun militkreatan logikon kaj ebligi al la du popoloj kunekzisti. Sen tamen ĵeti pudoran vualon sur la origino de la tragedio...

En 1998, kiam la unua eldono de tiu ĉi libro aperis, neniu israela „nova historiisto” – escepte de Tom Segev kaj lia *Sepa miliono*⁸, mirinda studaĵo pri Israelo kaj la genocido, publikigita de Liana Levi – ne havis la bonŝancon altiri la atenton de franca eldonisto. Dek jarojn poste, la franca leganto povas legi *La Unuaj Israelanoj*, ankaŭ de Tom Segev⁹, kaj *La milito de 1948 en Palestino*, de Ilan Pappé¹⁰ kaj *La milito de Palestino*. Malantaŭ la mito de 1948, gvidata de Eugène L. Rogan kaj Avi Shlaim¹¹. Tamen, nek *The Birth of the Palestinian Refugee Problem*, nek la dua eldono kiun Benny Morris aperigis de ĝi en 2004, estas tradukitaj al la franca ... Kiaj ajn estas la motivoj, ideologiaj kaj/aŭ komercaj, la cenzuro, kiu n ni tiam denunciis, ne malaperis komplete. Kaj tamen, se la israelanoj havis la rajton malkovri la veron pri la naskiĝo de ilia ŝtato kaj, samokaze, de la palestina problemo, oni demandas sin kial la francoj ne havu ĝin ankaŭ – kaj komplete!

8 *Septième million*, Lima Levi, Parizo, 1992.

9 *Les Premiers Israéliens*, ĉe Calmann-Levy.

10 *La Guerre de 1948 en Palestine*, La Fabrique.

11 *La Guerre de Palestine. Derrière le mythe de 1948*, Autrement.

Sesdek jaroj post starigo de la ŝtato Israelo kaj dudek jaroj post apero de ĝiaj unuaj libroj pri historio indaj je tiu nomo, ni ĉiukaze fieras kontribui al korektado de tiu „forĝeso”.

Ĉapitro 1

DE LA GENOCIDO ĜIS LA DIVIDO DE PALESTINO

Flushing Meadows, ĉe Novjorko, la 29-an de novembro 1947: per du-triona plimulto, necesa, de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj adoptas, sub la nomo de rezolucio 181, planon de divido de Palestino. Per 33 voĉoj por (de kiuj Usono kaj USSR), 13 kontraŭ kaj 10 sindetenoj (de kiuj Britio), ĝi decidas krei du ŝtatojn, unu judan kaj la alian araban, tamen metante Jerusalemon kaj la sanktejojn sub „*apartan internacian reĝimon*”.¹

Por la cionista movado la horo estas historia. Mil naŭcent jaroj post la malapero de ĉia juda ŝtata strukturo en la Santa Tero, la internacia komunumo rekonas la rajton de la judoj tie rekonstrui ŝtaton – apud, estas vere, ŝtato araba. Dum jarcentoj, certe, la piaj judoj de la diasporo promesis al si ne forgesi Jerusalemon, tiagrade ke oni tie rendevuis rite „*venontan jaron*”. Sed nur malmultaj, tra ĉiuj ĉi generacioj, pensis vere rekrei tie judan suverenecon. Venis Theodor Herzl: emociita de la Dreyfus-afero, kiun li sekvis en Parizo por sia gazeto, tiu juda intelektulo ĝis tiam asimilisma, verkas *La ŝtato de la judoj* kaj, jaron poste, en aŭgusto 1897, kunvenigis la unuan Mondan Judan Kongreson. Alprenante sian nomon de Ciono, monteto de Jerusalemo, la cionistoj postulas por la „juda popolo” „hejmon publike agnoski-

1 Vd la tekston de la dividoplano en Alain Gresh kaj Dominique Vidal, *Palestine 47, un partage avorté* (Complexe, Bruselo, 1987), de kiu tiu ĉi ĉapitro prentas plurajn teksterojn.

tan kaj jure garantiitan".²

Sed tiu projekto, Herzl scias tion, havas ŝancon sukcesi nur se ĝi ĝuas la apogon de granda potenco. Vane la fondinto de cionismo provis konvinki la otomanan sultanon, la imperiestron Vilhelmo, la ministrojn de la caro de Rusio, Witte kaj Von Plehve, aŭ la Papon Pio X. En 1904, la fondinto de la politika cionismo turnas sin fine al Londono: *„Anglio, la potenca Anglio kun sia perspektivo kiu ĉirkaŭbrakas la mondon, komprenos nin, nin kaj niajn aspirojn, lanĉas li antaŭ la kvara Kongreso de lia movado. Kun Anglio kiel apogopunkto ni povos esti certaj ke la cionisma ideo impetos pli antaŭen kaj pli alten ol iam ajn antaŭe.”* Sed Herzl mortas en 1908. Naŭ jarojn poste, Haim Weizmann realigis lian revon. Ĉar la registaro de Ŝia Gracia Moŝto, en plena mondmilito, bezonas la apogon de la judoj: tuj, por garantii la engaĝiĝon de Usono kaj de Rusio kontraŭ Germanio; je pli longa tempo, por doni al si kroman atuton por la dispecigo de la Otomana Imperio. Pro tio la fama Balfour-deklaro de la 2-a de novembro 1917: *„La registaro de Ŝia Moŝto konsideras favore la starigon en Palestino naciajn hejmon por la juda popolo kaj uzos ĉiujn siajn fortojn por la realigo de tiu celo, ĉe kio estas klare komprenite ke nenio estos farata kio povus lezi la civilajn kaj religiajn rajtojn de la nejudaj kolektivajoj”*— kiuj, ni substreku tion, konsistigas tiam 90 % de la loĝantaro de Palestino...

Kaj, surbaze de la mandato donita al ili en 1922, la britoj tenas sian parolon... pri la unua punkto. Danke al la brita administracio, la juda komunumo de Palestino, nomata Jiŝuv, fariĝas ŝtato en la ŝtato. La nombroj ne povas mensogi: de 1922 ĝis fine de 1946, la nombro da judoj kreskas de 84.000 al 608.000, do de dekono al triono de la tuta loĝantaro; la surfaco posedata de la judoj etendiĝas, inter 1897 kaj 1947, de 20.000 al 180.000 hektaroj, do 7 % de la teroj sur kiuj la judaj kolonioj, kies nombro kreskis de 27 al 300, produktas 28 % de la terkultura produkto de Palestino; kaj la industria produktado de la Jiŝuf kvazaŭ eksplodas de la

2 Citita de Simba Flapan, *The Birth of Israel. Myths and Realities*, Croom Helm, Londono kaj Sidneo, 1987, p. 189.

indico 100 en 1920-1922 al la indico 1.029 en 1937-1938, por refoje duobliĝi ĝis la fino de la dua mondmilito; la juda mezuma enspezo atingas tiam la duoblon de la araba mezuma enspezo³ ...

Sola limo al tiu ekspansio: la rezistado de la araboj de Palestino. Ĝi montriĝas pli kaj pli masive kaj perforte, en la mezuro de la juda enmigrado ampleksiĝinta pro la kreskanta nazia danĝero. Post la unuaj seriozaj kolizioj de 1921 kaj de 1929 sekvas, de 1936 ĝis 1939, ribelo kiu rapide alprenas ecojn de interna milito. Helpe de la judaj fortoj, la brita armeo subpremas la ribelon. Sed la Foreign Office modifas sian politikon, por ne puŝi la araban mondon, profunde tuŝita de la sorto de siaj palestinaj fratoj, en la brakojn de Hitlero. Jen la „Blanka Libro” de 1939: Londono limigas la judan enmigradon al 75.000 homoj en kvin jaroj, restrikta la aĉeton de teroj kaj promesas konduki en kvin jaroj Palestinon al sendependeco kun maksimume triono da judoj.

Por ke tio ne reokazu...

La britaj politikistoj provas vane, post fino de la Dua Mondmilito, sekvi tiun planon: ĝi estas simple neaplikebla. *„Fine de la milito, notas Élie Barnavi, vide al la hororoj de la mort-koncentrejoj, la malkovro de la amplekso de la katastrofo preskaŭ ses milionoj da viktimoj, do triono de la juda popolo-, la centmiloj da apatiaj supervivantoj kiujn neniu volas havi, ĉio ĉi helpas la cionistajn tezojn de la simpla evidenteco: por ke „tio” ne reokazu, necesas por la judoj propora tero. Tiel, por la unua fojo en la historio de la movado, la aliĝo de la judaj amasoj tra la mondo estas plena kaj komplete, same kiel la simpatio de la monda opinio.*⁴ Kaj la israela historiisto konkludas: *„Kiom ajn ŝoke tio povas ŝajni, Hitlero estis certe la plej potenca levilo en la konstruado de la*

3 La plej multaj nombroj cititaj ĉi tie estas prenitaj el „La mise en valeur de la Palestine”, Notes et études documentaires, La Documentation française, Parizo, 1948.

4 Élie Barnavi, Une histoire moderne d'Israël, Flammarion, Parizo, 1988, p. 26-27.

juda ŝtato"⁵.

Jen ŝtato kies ĉefa tasko estas akcepti ĉiujn kiuj, revene de la infero, volas rekomenci sian vivon, unuavice la centmiloj da gehomoj stakitaj en la tendaroj de delokituloj (DP), kaj de kiuj multaj povas iri nenien krom Palestinon. Ĉar ili ne povas aŭ ne volas reveni en sian devenlandon, kie la kontraŭjudismo restas vigla, kiel pravas, en Pollando, komence de julio 1946, la pogromo de Kielco.⁶ La revo de multaj de ili estas kompreneble atingi la Novan Mondon: en 1947, troviĝantaj antaŭ *„egala ebleco iri al Palestino aŭ al Usono, 50 % de la supervivantoj [de la koncentrejoj] irus al la mal-feliĉaj judoj de la diasporo en Usono”*⁷. Sed la usonaj aŭtoritatoj donas vizojn nur pogute: inter 1940 kaj 1948, ili akceptis entute nur 57.000 eŭropajn judojn.⁸ Tiu tragika sakstrato nutras la kontraŭleĝan enmigradon en Palestinon, kiu, organizita de la Mossad Alia Bet, fariĝas amasa. Tiom ke la disponoj de la britoj por haltigi la fluon truniĝas kontraŭ ili: la dramo de la ŝipo *Exodus*, en somero 1947, indignas mondan publikan opinion eĉ pli mobilizitan ol ĝi estis fronte al la kontraŭjudaj persekutoj. . .

Konsciaj pri la avantaĝoj kiujn donas al ili tiu situacio, la gvidontoj de la ŝtato Israelo sciis ilin plej bone uzi. Kontraŭ la brita „okupanto” ili organizas rezistadon kiun ili kreskigis ĝis uzado de terorismo. Ekde 1940 la plej ekstremisma grupo, nomata grupo Stern, multobligis siajn atakojn. En 1944 aldoniĝis la Irgun, ankaŭ devena de la reviziisma tendenco, kiu situas dekstre de la cionisma movado. Sed baldaŭ la eksterleĝa juda armeo, la Hagana, lanĉas sin siavice en la armitan batalon. La brita soldataro retiras sin ĉirkaŭ la sidejoj de la mandat-administrado, kromnomataj de la judoj „Bevingrad”. La 22-an de julio 1946, atenco kontraŭ la

5 De 1919-1931, 116.796 judoj enmigris Palestinon, do po 8.343 jare. De 1932 ĝis 1939, ili estas 247.723, do po 30.965 jare. Aldoniĝas 13.922 enmigrantoj ĝis la 14-a de majo 1948, kaj 690.000 ĝis fine de 1951.

6 Vd Marc Hillel, *Le Massacre des survivants*, Plon, Parizo, 1985.

7 Walter Laqueur, verko cit. p. 613.

8 David Lazar, *L'Opinion française et la naissance de l'État d'Israël, 1945-1949*, Calmann-Lévy, Parizo, 1972, p. 76.

hotelo King David, sidejo de la mandato, faras centon da mortviktimoj. Por la brita opinio, tio estas tro: „*Bring the boys home!*” krias la londonaj manifestaciantoj, kiuj scias ke dum du jaroj preskaŭ 150 anglaj militistoj falis en la Santa Tero kaj 350 estis grave vunditaj. La registaro de Ŝia Gracia Moŝto siavice konsideras ke Britio, elĉerpita de la Dua Mondmilito, jam ne havas la rimedojn por teni 100.000 soldatojn – dekonon de siaj eksterlandaj fortoj – en Palestino, nek elspezi la 40 milionojn da sterlingoj kiujn ĉiujare kostas la mandato. Restas trovi la plej taŭgan solvon por la britaj interesoj en Proksim-Oriento...

Necedemaj ĉe la britoj, la strategiistoj de la Juda Agentejo aliflanke montras grandan fleksiĝemon por delogi la aliajn okcidentajn opiniojn – kaj gvidantojn. En majo 1942, dum la Kogreso nomata de Biltmore (pro la nomo de la hotelo de Novjorko en kiu ĝi okazis), David Ben Gurion kunigis la esencon de siaj trupoj ĉirkaŭ la sloganon „*Juda Commonwealth*” en Palestino. Iom post iom, tamen, li konsideras ke, por la judoj, postuli la tutan Palestinon signifas nei ĉi-an rajton de la araboj kaj do perdi la simpation de la plej multaj okcidentaj potencoj kiuj havas ĉiuj, diversgrade, interesojn en la landoj de la regiono. La Juda Agentejo pleje konsideras ilin. Post rifuzi planon de aŭtonomeco kiu antaŭprezentis ĉu la dividon ĉu la federacian ŝtaton, nomatan plano Morrisson-Grady⁹, ĝi surtabligas siajn kartojn deklarante sin – la 4-an de aŭgusto 1946 – „*preta diskuti pri propono celanta starigi vivkapablan judan ŝtaton en konvena parto de Palestino*”¹⁰.

Duobla frapo: la atenco de la King David por la brita rezisto, kaj la diplomatia returniĝo de la 4-a de aŭgusto por la usona hezitemo. De nun la eventoj akceliĝas. La 18-an de februaro 1947, post fiasko de lasta juda-araba konferenco

9 Prezentita komune de Vaŝingtono kaj Londono, sed laŭ instigo de tiu, ĝi konsistas en interŝanĝi 100 000 enmigrad-permesojn kontraŭ la konservo de unueco palestina ŝtato sub protektorato de la Unuiĝintaj Nacioj.

10 En: Michael J: Cohen, *Palestine and Great Powers 1945-1948*, Princeton University Press, 1982, p. 145.

pri plano de kantonigo de Palestino, la [brita] laborista registaro decidis „*porti la problemon en ĝia tutaĵo antaŭ la Unuiĝintajn Naciojn*”. Tiuj kreas, en aprilo, specialan komisionon, la UNSCOP, por ekzameni la eblajn solvojn. Intertempe, la 14-an de majo 1947, decida turnopunkto, la sovetiano Andrej Gromiko rekomendis, de la tribuno de la UN, la „*starigon de unuiĝinta juda-araba ŝtato*” aŭ, se tio ne eblas, „*la dividon de tiu lando en du ŝtatojn*”.¹¹ Surloke la situacio devigas la subtenantojn de la unua opcio aliĝi al la dua.

Stranga soveta-usona interkonsento

Laŭ tiu perspektivo aperas tre rapide, inter Vaŝingtono kaj Moskvo, interkonsento al kiu Israelo multe dankas sian ekziston. Tiu interkonsento ŝajnas, retrorigarde, des pli nekredebla ĉar ĝi okazas en tiu „*terura jaro*” 1947- la esprimo estas de la generalo de Gaulle. Per la Truman-doktrino Usono tiam metas sin ĉekapen de la „libera mondo” fronte al la „sovetia ekspansiemo”. Kelkajn monatojn poste, la sovetianoj, per la Ĵdanov-raporto, adoptas la trumanan vizion starigante la teorion de la „du tendaroj”, la imperiisma kaj la antiimperialisma. Kiel rimarkigas Lily Marcou, „Ĵdanov ŝajnis finfari kaj ĝustigi tion kion Truman proponis”.¹² Fakte, la mondo fariĝis scenejo de la malvarma milito kaj la iamaj aliancanoj venkintaj la hitlerismon ekdisputis pri la planedo. Marshall-plano, ekskludo de la komunistaj ministroj el la okcidenteŭropaj registaroj, kreado de la Kominform, usona apogo al Britio en la interna milito en Grekio, akaparo de la potenco de la KP en Prago, ondo de makartismo en Usono: strange, ĝuste en plena reciproka akriĝo- dum komencas la batalo kiu alfrontas ilin dum pli ol kvardek jaroj kaj kiu finiĝis per sensacia knokaŭto- okazas ke la kontraŭuloj interkonsentas pri la demando, tamen dorna, de Palestino.

Verdire, kvankam la usonaj kaj sovetiaj strategiistoj alve-

11 *Origines et évolution du problème palestinien, deuxième partie: 1947-1977*, Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko, 1979, p. 7.

12 Lily Marcou, *Le mouvement communiste international depuis 1945*, Presses universitaires de France, Parizo, 1980, p. 10.

nas al sama konkludo, tio okazas laŭ ja malsamaj argumentoj. Por la prezidanto Truman, kiel por lia antaŭulo Franklin Roosevelt, temas pri perado inter tre heterogenaj nepraĵoj. La unua koncernas la sintenon al la brita aliancano, kiun Vaŝingtono ne volas ŝajnigi forlasi. La dua, pri kiu kompreneble insistas la ŝtatdepartemento, estas la duobla risko kiun sekvigus malamikiĝo de la naskiĝantaj arabaj ŝtatoj: por la provizo de Usono je petrolo kaj por ĝiaj aspiroj anstataŭi Brition en la regiono. La tria, kaj sendube la plej kategoria, rilatas kun la elekto-pezo de la uson-judaj organizoj por la reelekto de la prezidanto Harry Truman en la prezidant-elektoj planitaj por novembro 1948.¹³

Tute alia estas la aliro de Jozefo Stalino.¹⁴ Konsidere al la tradicia kontraŭcionismo de la marksistoj, kaj aparte iu de la sovetiaj komunistoj, la apogo de Sovetunio al la naskiĝo de juda ŝtato povas certe ŝajni malkohera. Sed ni memoru ke, en la stalina politiko, la interesoj de la sovetia ŝtato ĉiam antaŭrangis antaŭ la ideologiaj konsideroj. Nu, en Proksim-Oriento, Moskvo donas prioritaton al la batalo kontraŭ la dominanta imperiismo en la regiono, tiu de Londono, kies Aĥila kalkano situas tute klare en Palestino. Manke, tiuepo-

13 Inter la dokumentoj de la CIA ekssekretigitaj en 2007 troviĝas la raporto transdonita de la agentejo al la prezidanto Truman la 28-an de novembro 1947, ĝuste antaŭ la decida voĉdonado. Titolita „La konsekvencoj de la divido de Palestino” ĝi indikas nome: „Armitaj alfrontiĝoj inter judoj kaj araboj eksplodos se la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj adoptas la divido-planon [...]. Oni antaŭvidas ke la judoj povas mobilizi proksimume 200.000 batalantojn [...] Komence, ili ricevos gravajn sukcesojn kontraŭ la araboj pro la supereco de ilia organizo kaj de ilia trejniteco. [...] Subtenante la dividon, Usono jam perdis multon de sia prestiĝo en Proksim-Oriento. Se la divido estus trudita al Palestino, la konflikto kiun ĝi sekvigus, serioze perturbus la socian, ekonomian kaj politikan stabilecon de la araba mondo, kaj la usonaj komercaj kaj strategiaj interesoj estus en grava danĝero. [...] La malriĉeco, la malordo kaj la malespero, sur kiuj prosperas la komunista propagando, (tie) kreskus.” (Kp. www.foia.cia.gov/).

14 Vd pri tiu temo la elstaran *Staline, les juifs et Israël* de Laurent Rucker, PUV, Parizo, 2002.

ke, de potenca araba nacia movado kapabla alianciĝi kun la USSR, tiu volas uzi la cionistan movadon kiel levilon por skui la britan „jugon” en la Sankta Tero kaj, trans tiu, en tuta Levantio. Helpe de la nova ĉeĥoslovaka registaro, la sovetianoj iras kun tiu logiko ĝis la lasta konsekvenco: ili ne hezitis, oni vidos tion, liveri al la judaj soldatoj la armilojn – kaj eĉ „volontulojn” – sen kiuj Israelo sendube ne venkintus, se ne kontraŭ la palestinaj milicoj, ĉiukaze kontraŭ la armeoj de la arabaj ŝtatoj. Tiu senambigua engaĝiĝo tamen ne haltigis la samtempan kreskon de kontraŭjuda subpremo same masiva kiel brutala: ŝajnas ke la Kremlo timis, ke ĝia apogo al la juna juda ŝtato vekus la „naciismon” de la sovetiaj judoj kaj instigus ilin organizi sin kiel tiaj. Necesis frapi antaŭ ol estu skuata la piramideca strukturo de la sovetiaj potenco kaj socio...

Elektitaj danke al tiu sovetia-usona konverĝo, la dek-unu membroj de la UNSCOP malkovras landon en maskita militostato, malgraŭ la alvokoj al batalhalto, kiam ili alvenis en Palestino la 16-an de junio 1947. La militostato dekretita de la brita Alta Komisararo ne malhelpas la reviziismajn milicojn agi. La komisiono vane atingis la suspendon de la ekzekuto de la tri aktivuloj de la Irgun, tiu kaptis, la 12-an de julio, du britajn serĝantojn, kiujn ĝi ekzekutis post la foriro de la dek-unu saĝuloj. Pinto de la hororo, la homoj kiuj provas dekroĉi iliajn kadavrojn pendigitajn al arboj de arbaro estas grave vunditaj: la teroristoj estis subminintaj la kadavrojn!

Alia memorinda evento: monaton post alveno de la Dek-unuopo en Palestinon, la *Exodus 1947* – la eksa *President Warfield*, malnova ŝipaĉo de 4.000 tunoj luprenita de la Hagana – prezentiĝas antaŭ Hajfo, kun 4.500 judaj enmigrantoj, plejparte supervivantoj de la naziaj persekutoj. Ekde aŭgusto 1946, la britoj deportis al Kipro la kontraŭleĝajn judajn alvenantojn – estis 11.000 da ili nur en la monatoj marto, aprilo kaj majo 1947. Ĉi-foje la aŭtoritatoj, avertitaj pri la cionistaj intencoj, inaŭguras novan taktikon: la forŝovon. Post sturmo al la ŝipo, disvastigata per radio al la tuta mondo kaj kiu faras kvar mortvktimojn kaj multnombrajn vunditojn, la ŝipo kapitulacas ĉe matena krepusko. Posttagmeze,

en Hajfo, ĝiaj pasaĝeroj estas krude translokitaj al britaj militŝipoj sub la okuloj de granda amaso, inter kiu Emil Sandstrom, la prezidanto de la UNSCOP.

Tiuj bildoj, pote tiuj de la reveno de la ŝiparo al Port-de-Bouc, la 29-an de julio, kaj eĉ pli la armita elŝipigo de la pasaĝeroj en Hamburgo, la 8-an de septembro, nutris por la daŭro la kontraŭbritan propagandon de la Juda Agentejo. „*Exodus 1947*, klarigas Christopher Sykes, *estis unu el la plej gravaj sukcesoj de la cionismo antaŭ la naskiĝo de la ŝtato Israelo. Ĝi fariĝis la temo de sagao, libro kaj filmo – kun tiom da simileco kun la eventoj de la Iliado de Homero kun la sieĝo de Trojo- kiuj havis konsiderindan sukceson*”.¹⁵

Eksterordinara fosaĵo

Lando en stato de milito kaj internacia opinio en emocio pro la dramo de la savitoj el la mort-koncentrejoj: la etoso en kiu la enket-komisiono estis laboronta, ne brilas per sereneco. Krome, la Araba Alta Komitato (AAK) rifuzas ĉian kunlaboradon sub preteksto ke la demando de sendependeco ne troviĝas en la mandato de la UNSCOP. „*La naturaj rajtoj de la araboj de Palestino, kontraŭmetas ĝi, estas evidentaj kaj ne povas daŭre esti la temo de enketo*.”¹⁶ La gvidantoj de la Juda Agentejo siavice pledas sian kaŭzon verve, invokante la historion kaj la biblion, la turmenton de la judoj kaj la popolekstermon, la ekonomiajn realigojn de la Jiĥuv kaj la favorajn sekvojn por la araba komunumo. Ĝia prezidanto, David Ben Gurion, postulas la finon de la mandato, ĉu „*brita aŭ de la Unuiĝintaj Nacioj*”. Post transira periodo kiu garantias la alvenon de miliono da judoj en Palestinon, sendependa ŝtato naskiĝos sur la tuta teritorio. Ĉar delegitoj de la UNSCOP petas lin precizigi sian penson, li diras: „*Ni pretas konsideri la demandon de juda ŝtato sur signifa parto de Palestino [tamen] reasertante nian rajton pri tuta*

15 Christopher Sykes, *Cross Roads to Israel*, Collins, Londono, 1965, p. 384.

16 *Origines...*, verko cit., p. 263-264.

Palestino."¹⁷

Postuli maksimuman celon kaj samtempe diri ke oni pretas esplori kompromison: tiu fruktodona metodo estis ellaborita de la Ekzekutivo de la Juda Alianco.¹⁸ La bojkoto praktikata de la HCA fortigis male, ĉe la okcidenta flanko, nekomprenon same politikan kiel kulturan – la okcidentanoj, en tiu epoko, evidente informitaj pri la tragika sorto de la judoj, sciis nenion, aŭ preskaŭ nenion, pri la aspiroj de la palestinaj araboj, kaj pli ĝenerale de tio kion oni tiam ankoraŭ ne nomis tria mondo. Tiu manko ne estis forigita de la kelkaj sekretaj renkontiĝoj kun la reprezentantoj de la palestina kaŭzo¹⁹ nek de la memorando de la palestina komunista movado, la Ligo de Nacia Liberigo (LLN laŭ la franca), nek ankoraŭ de la interparolado de la UNSCOP, en Bejruto, la 23-an de julio 1947, kun la ŝtatoj de la Araba Ligo. Tiuj ankaŭ postulis la finon de la mandato – post transira periodo – kaj la starigon de sendependa araba ŝtato, sed kiu subskribus alianc-kontrakton kun Londono. La judoj kontraŭleĝe enmigrintaj en Palestinon aŭ kiuj ne estis petintaj la civitanecon – totale, laŭ ili, 400.000 personoj, do du trionoj de la enmigrintoj – estus, la unuaj, elpelotaj, la duaj liveritaj al la bona volo de la estonta registaro, do de la Alta Araba Komitato.²⁰ „*Mi aŭskultis viajn postulojn*, reagis la ĉeĥoslovaka delegito, kaj ŝajnas al mi ke via vizio de la kompromiso estas jena: ni volas la kontentigon de ĉiujn niaj postuloj, kaj la resto povas esti diskutata.”²¹ Sendube ĝusta interpreto, sed kiu neglektis la psihan faktoron: el araba vidpunkto, la alfrontiĝo en la Sankta Tero kontraŭmetas ne du legitimaĵojn, sed la indiĝenojn kun eksterlandaj koloniistoj.

17 United Nations Special Committee on Palestine, *Report to the General Assembly*, vol. III, *Aneksa A. Oral Evidence Presented at Public Meetings*, Novjorko, 1947, p. 62.

18 Michael J. Cohen, verko cit., p. 263-264.

19 Vd, pri tiuj renkontiĝoj, Khalil Budeiri, *Sesdek-ses jaroj en la palestina nacia movado* (en la araba), Salaj al Din, Jerusalemo, 1981, p. 133.

20 Citita de Aharon Cohen, *Israel and the Arab World*, W. A. Allen, Londono, 1970, p. 376.

21 *Report on the General Assembly...*, verko cit., p. 245.

Por kompletigi la esprimiĝon de ĉiuj vidpunktoj, la Dek-unu disiĝis en du subkomisionoj: unu por la tendaroj de „delokitoj” en Germanio kaj Aŭstrio, la alia por pristudi la demandon de la religiaj interesoj kaj de la sanktejoj kaj la estontan statuson de Jerusalemo. Fine de aŭgusto, en Genevo, dum la kvindek-dua kaj lasta seanco, ĉiu membro de la UNSCOP subskribis la finan raporton transdonitan, fine de aŭgusto 1947, al la ĝenerala sekretario de la UN.

Du popoloj, du ŝtatoj

Unuanime la komisiono rekomendis dekon da principoj por la estonteco. Kaj unue, la finon de la mandato kaj la sendependecon de Palestino, fine de „transira periodo kiom eble plej mallonga” ²², kun administra aŭtoritato respondeca antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj. La Dek-unu rekomendis ankaŭ specialan statuson por la sanktejoj, la respekton de la demokratiaj principoj kaj la protekton de la rajtoj de la malplimultoj kaj de la normoj de la UN en la estontaj konstituciaj tekstoj. La ekonomia unueco de Palestino estas definitiva kiel „*absoluta neceso*”. Fine, la komisiono rekomendis ekstreme urĝan internacian interkonsenton por ĉesigi la dramon de la eŭropaj judoj en danĝero kaj tiel „mildigi” la palestinan ŝarĝon. Sur tiu komuna soklo, du tezoj estas metitaj antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj. Barato, Irano kaj Jugoslavio submetas la koncepton de sendependa federacia ŝtato entenanta araban ŝtaton kaj judan ŝtaton. Siaflanke Ĉeĥoslovakio, Gŭatemalo, Kanado, Nederlando, Peruo, Svedio kaj Urugŭa-

²² Ĉiuj citaĵoj el la proponoj de la UNSCOP estas prenitaj el la „Rapport de la Commission spéciale pour la Palestine à l'Assemblée générale des Nations unies (32 août 1947) deuxième partie. *Notes et études documentaires*, [Raporto de la Speciala Komisiono por Palestino al la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj (31-a de aŭgusto 1947) dua parto”. *Dokumentaj notoj kaj studaĵoj*,] La Documentation française, Parizo, n-ro 805, 17-a de januaro 1948.

jo esprimas sin por divido-plano kun ekonomia unio. „La rajtoj kiujn invokas la araboj kaj la judoj pri Palestino estas valoraj de ambaŭ flankoj, sed nepacigeblaj”, substrekas la redaktintoj. Pro tio, laŭ ili, la neevitebla perspektivo de juda ŝtato, de araba ŝtato kaj de kuratoreca internacia reĝimo por la urbo Jerusalemo, kiuj entenus:

T A B E L O

[nur en la papera eldono]

Transira periodo de du jaroj kontribuas ebenigi la multajn obstaklojn por la realigo de tiu skemo, des pli delikata ĉar ĉiu de la du estontaj ŝtatoj konsistas el tri partoj apenaŭ ligitaj inter si.

„*Absurdaj, nepraktikeblaj, maljustaj*”: tiuj vortoj uzataj de la Alta Araba Komitato, por kvalifiki la du planojn de la UN-SCOP, bone esprimas ĝian pozicion. „La araboj de Palestino, poste elkriis unu el iliaj reprezentantoj, estas firme deciditaj kontraŭstari per ĉiuj rimedoj kiujn ili disponas ĉian projekton kiu kondukus al dispecigo, al dispartigo aŭ al la divido de ilia lando aŭ donus al malplimulto specialajn kaj preferajn rajtojn kaj statuson.”²³ Al tiuj netrakteblaj kredokonfesoj la cionistoj kontraŭmetas, denove, sian senton pri kompromiso apogatan sur bona kono de la internacia socio. Dum la Irgun kaj la Lehi pasiiĝas kontraŭ ĉia „*amputado*” de Erec Israel, ordonante al la judoj daŭrigi la batalon por unuiĝinta Palestino, la Juda Agentejo rifuzas la federacian planon, laŭ kiu la judoj „*estus por ĉiam reduktitaj al statuso de malplimulto*”²⁴. Aliflanke, kvankam bedaŭrante la ekskludon de Okcidenta Galileo kaj Jerusalemo de la planita juda ŝtato, ĝi akceptas la konkludojn de la plimulto kiel diskutbazon.

Meze de septembro 1947 malfermiĝis en Novjorko la dua ordinara sesio de la Ĝenerala Asembleo de la UN. Por deba-

23 *Yearbook of the United Nations [Jarlbro de la Unuiĝintaj Nacioj] 1947-1948*, Novjorko, p. 233.

24 *Origines...*, verko cit., p. 23.

ti pri la konkludoj submetitaj de la UNSCOP, ĝi starigas tiucelan komitaton kies laboroj etendiĝis al pli ol du monatoj. Meze de novembro necesis decidi: Londono konfirmas sian decidon definitive eliri el la palestina kaĉejo- la 13-an de novembro ĝi anoncas ke la lasta brito forlasos la Sanktan Teron la 1-an de aŭgusto 1948. Unu post la alia, usonanoj kaj sovetianoj esprimas sin oficiale por la divido-plano proponita de la plimulto de la UNSCOP, kiu ricevas lastajn modifojn: Jafo kaj Berŝebo estas aligitaj al la araba ŝtato, kio reduktas la araban minoritaton de la estonta juda ŝtato de 407.000 al 325.000 personoj; la transira fazo estas mallongigita al nur du monatoj (anstataŭ du jaroj) ekde la fino de la „mandato” fiksita por la 1-a de aŭgusto 1948; kvinmembra komisiono estas komisiita por la administrado de Palestino en la mezuro de la retiriĝo de la britoj.

Spite al la kontraŭeco de Britio kaj de la arabaj ŝtatoj, la sovjeta-usona projekto sukcesas en la tiucela komisiono, la 25-an de novembro, per 25 voĉoj kontraŭ 13, kun 17 sindetenoj kaj 2 forestantoj – mankas do unu voĉo por atingi la du-trionan plimulton necesan por la voĉdonado en la Ĝenerala Asembleo . . . En zorgo pri sia reelektio, Harry Truman lanĉas sian tutan prestiĝon en la batalon. Ĉiuj rimedoj taŭgas. Tiel, laŭ instigo de la demokrata registaro, la gum-kompanio Firestone avertas Liberion ke ĝi revizius siajn projektojn de etendiĝo en la lando se Freetown ne renversus sian voĉon favore al la divido. Oni minacas eĉ Francion, kiu sindetenis pro timo antaŭ reagoj en Nordafriko, ĉesigi ĝian provizadon. Kelkaj delegaci-ĉefoj ricevis la proponon de „kromaĵoj”, se ne donacojn por ilia edzino.²⁵

Nekapablaj kontraŭpezi la kontraŭan premon, la arabaj ŝtatoj provas prokrastigan manovron. Nome de la Araba Ligo, la libanano Camille Chamoun konsentas al la ideo de federacia ŝtato kun judan kaj arabaj kantonoj. Tro malfrue. Per 33 voĉoj kontraŭ 13 kaj kun 10 sindetenoj, la 29-an de novembro 1947, la Ĝenerala Asembleo ratifas la dividon de

25 Michael J. Cohen, verko cit., p. 298, kaj Richard P. Stevens, *American Zionism and U.S. Foreign Policy (1942-1947)*, Pageant Press, Novjorko, 1962, p. 178.

Palestino: ĝi kreas judan ŝtaton de 14 100 km² konsistantan el Orienta Galileo, la marborda strio de Akro ĝis Isdud kaj la Negev-dezerto, entenante 558.000 judojn apud 405.000 araboj; araban ŝtaton de 11.500 km² konsistantan el Okcidenta Galileo, Samario kaj la marborda strio en la regiono de Gazao, kun 10.000 judoj kaj 804.000 araboj; internacian zonon grupanta Jerusalemon kaj Betlehemon kun la sanktejoj, 100.000 judojn kaj 105.000 arabojn. Kaj ĝi komisias Bolivion, Ĉeĥoslovakion, Danlandon, la Filipinojn kaj Panamon zorgi, interkonsente kun la mandata ekspotenco, pri la surloka transiro.

Dum la judoj dancas pro ĝojo en la stratoj de Tel-Avivo, la araboj ploras kaj pugnigas la manojn. Sekvatage, la palestina ĵurnalo *Falastin* titolas: „La araba Palestino estis forvendita en la internacia foiro de la fimakleristoj”. Kaj, tiun saman 30-an de novembro, sep membroj de la Jiŝuf komencas la amasbuĉadon. Jen komencis la milito – unue juda-palestina, poste israela-araba – detruonta la landon.

Ĉapitro 2

ĈU DAVIDO KONTRAŬ GOLIATO?

„700.000 judoj mezuras sin kun 27 milionoj da araboj unu kontraŭ 40.”¹ Tiel, la 16-an de junio 1948, la ĉefministro de Israelo, David Ben Gurion, prezentas al sia registaro la okazantan militon, kiun batalhalto interrompis por iomete malpli ol monato. Kvin monatojn poste, la israela prezidanto Haim Weizmann skribas al sia usona kolego Harry Truman: „*Niaj malamikoj malsukcesis en siaj klopodoj por venki nin per la brutala forto kvankam ili estis dudekoble pli multnombraj ol ni.*”² Davido fronte al Goliato: decida en la konscio de la israelanoj, la imago kiu prezentas malfortan judan komunumon de Palestino, subarmitan, minacatan je eks-termo per unueca kaj superarmita araba mondo akompanis la militon de 1947-1949 – kiel cetere la sekvajn ... – en la okcidentaj opinioj.

Kvankam konforma al la pure demografiaj fortrilatoj, ĝi estas en realo tre malproksima de la armeaj kaj politikaj-diplomatiaj realecoj de la epoko. Kiel skribas Benny Morris, „la mapo kiu montras etetan Israelon kaj gigantan araban ĉirkaŭaĵon ne reflektis – kaj ĝis nun daŭre ne reflektas – precize la veran armean fortrilaton en la regiono. Ne pli ol la komparoj de nombroj de loĝantaro”.³ La „novaj historiistoj” insistas, kun pruvoj, samtempe pri la supereco de la armitaj fortoj de Israelo kaj pri la strategiaj atutoj de la juda ŝtato: la dividoj de la araba mondo, la interkonsento farita de la Juda Agentejo kun la reĝo Abdallah de Transjordanio (kiu promesis, interŝanĝe de Cisjordanio, ne ataki la teritor-

1 Citita de Simba Flapan, *The Birth of Israel. Myths and Realities*, Croom Helm, Londono kaj Sidneo, 1987, p. 189.

2 *Saml.*

3 Benny Morris, *1949 and After. Israel and the Palestinians*, Clarendon Press, Oksfordo, 1990, p. 14.

ion asignitan de la UN al Israelo), la apogo de Britio al tiu aranĝo kaj la subteno samtempe de Usono kaj de Sovetunio, la simpatio de la monda publika opinio ktp. Pro tio, krom la pure arma dimensio, la ofta fulmeco de la judaj ofensivoj de printempo 1948 kontraŭ la palestinaj fortoj kiel, dum la somero kaj la aŭtuno, kontraŭ la arabaj trupoj enirintaj Palestinon ...

La laŭaserta supereco de la malamiko: jen unu el la sep „mitoj” kiujn Simha Flapan – eksdirektoro de la Departemento pri Arabaj Aferoj de la MAPAM kaj eldonisto de la revuo *New Outlook* – fervoras demonstri en sia libro, *The Birth of Israel*, invokante multajn atestojn de samtempuloj. Li memorigas ankaŭ ke jaron antaŭ la unua israela-araba milito, la estro de la ĉefstabo de la Hagana, Israel Galili, deklaris sin certa povi „*repuŝi ĉian atakon de la palestinaj araboj, eĉ se ili ĝuas la helpon de la arabaj ŝtatoj. La sola afero kiun ni bezonis, estis la malfermo de la havenoj por akiri la pezajn armilojn por alfronti la fortojn de la invadanto*”.⁴ La 3-an de marto 1948, Vivian Fox-Strangeways, brita oficialulo de la mandata registaro, estas citita kiel iu kiu „*ne tre zorge atentis la araban danĝeron, kaj tion sarkasme. Li ne komprenis kiel oni povis doni la plej etan gravecon al la historioj pri la araboj koncerne iliajn grandajn rezervojn de mono, de armiloj, de tankoj ktp. Kvankam li respektis la Araban Ligon, kiel longjara soldato, li sciis kian laboron postulas la preparado de la homoj al manipulado de tankoj ktp., kaj li estis totale konvinkita ke la judoj povas defendi sin kontraŭ ĉia araba atako*”.⁵ Du semajnojn antaŭ la fino de la brita mandato, Harold Beeley, la konsilisto de la sekretario de la Foreign Office, konfidis al la usonaj fakuloj ke „*por almenaŭ certa tempo, la judoj, fortigitaj de la rekrutoj venantaj tra la maro, povos retenigi kaj eble venki la arabajn armeojn, mizere organizitajn kaj malbone ekipitajn*”.⁶ Sama konkludo ĉe la kolonelo rosher Lund, fakulo de la Unuiĝintaj Nacioj: „*La judoj, danke al ilia larĝa rezervo de oficiroj trajnitaj kaj spertaj pri milito, havas nekalkulebl-*

4 Citita de Simha Flapan, verko cit., p. 191.

5 Saml.

6 Saml.

an superecon super la araboj.”⁷

Nombroj kiuj ne trompas

La nombroj cititaj el ĉiaj fontoj konfirmas, eĉ emfazas tiun pritakson. Tio evidentas pri la interna juda-palestina milito kiu furiozis de la 30-a de novembro 1947 ĝis la 14-a de majo 1948. Kaj Benny Morris kiel liaj kolegoj ne faris en tio malkovron. En *A Clash of Destinies, The Arab Jewish War and the Founding of Israel* [Kolizio de sortoj, la araba-juda milito kaj la fando de la ŝtato Israelo] , klasikaĵo el la jaro 1960, la israelanoj Jon kaj David Kimche malkaŝis la raporton prezentitan de Ismail Safwat Pasha, prezidanto de la Armea Komitato de la Araba Ligo, al la pintkunveno de la arabaj ŝtatestroj de la 12-a de decembro 1947: „La judoj en Palestino havis organizitajn armeajn fortojn de sume 50.000 homoj, sen kalkuli la rezervojn, [...] krome, sufiĉajn stokojn da malpezaj armiloj kaj grandajn kvantojn da artilerio, da kirasitaj veturiloj kaj sufiĉe bonan aerarmeon. Elirante el tiu taksado [...], Safwat konkludis ke la palestinaj araboj ne povus rezisti solaj, kaj ke estus do necese sendi la kiom eble plej bonajn armilojn al la palestinanoj, fortigi ilin per volontuloj kaj koncentri la regulajn arabajn armeojn ĉe la limoj de Palestino.”⁸

Laŭ Benny Morris⁹, en majo 1947, la Hagana nombras 35.000 plenkreskulojn, el kiuj 2.200 en la sturmtaĉmentoj de la Palmah, krome la 9.500 membroj de la junec-batalionoj de la Gadna. Tiuj fortoj disponas, en septembro de la sama jaro, pri 10.489 fusiloj, 702 malpezaj mitraloj, 2.666 fusil-mitraloj, 186 mezaj mitraloj, 672 2-colaj haŭbizoj kaj 92

7 Saml.

8 Jon kaj David Kimche, *A Clash of Destinies, The Arab Jewish War and the Founding of Israel*, Frederick A. Praeger, Novjorko, 1960, p. 79.

9 Benny Morris, *The Birth of the Palestinian Refugee Problem, 1947-1949*, Cambridge University Press, Kambriĝo, 1987, p. 21-22.

3-colaj haŭbizoj. Iom post iom aldoniĝas la armiloj fabrikitaj de la Hagana aĉetitaj en Okcidento kaj krome tiuj liveritaj de Prago ekde la 30-a de marto 1948: „En tiu nokto, rakontas Michel Bar-Zohar en sia biografio de Ben Burion, okazis vera miraklo, kiam granda aviadilo – la unua – veninte rekte el Ĉeĥoslovakio alteriĝas sur sekreta aerodromo. La 200 fusiloj, la 40 mitraloj kaj la miloj da kartoĉoj kiujn ĝi alportas estas tuj disdonataj al la batalantoj. Alia okazas sekvatage: la Nora, transportanta nome 4.500 fusilojn, 200 mitralojn kaj 5 milionojn da kartoĉoj el Ĉeĥoslovakio, rompas la anglan blokadon kaj akriĝas en la haveno de Tel-Avivo.”¹⁰

Kaj ĉe la palestina flanko? Daŭre laŭ Benny Morris, la Futuwah (junular-kompanioj) gvidataj de la klano Al-Husseini mobilizis penegge kelkcentojn da homoj kaj la Najjada (helpo-trupo) de Mohammad Nimr Al-Hawari kelkajn milojn. Ambaŭ estis ekipitaj de ofte malnovaj fusiloj, kaj la ribeluloj povis kalkuli kun nenia armilfabriko. Tiuj milicoj, taksas Benny Morris, *„estis nek psiĥologie nek korpe ekipitaj koncerne logistikon, organizon kaj armaĵon, por pli longaj agadoj ekster sia vilaĝo aŭ interkonsente kun aliaj armitaj grupoj. Multaj armitaj vilaĝanoj aliĝis aŭ provizore helpis al la unuoj de volontuloj kiuj moviĝis en Palestino komence de la milito, sed ĝenerale ili povis nur resti surloke kun siaj armiloj kaj – kun la ebla escepto de persistaj atakoj kontraŭ la veturilaro survoje de Tel-Avivo al Jerusalemo komence de 1948 – estis neniam centre organizitaj nek mobilizitaj por konkreta batalo kontraŭ la Jiĥuf”*.¹¹

Kaj li daŭrigas: *„La milicoj de ĉiu regiono kaj de ĉiu urbo, kelkfoje trans la malkonkordoj inter la trupoj de Hussein kaj de iliaj kontraŭuloj, agadis en granda mezuro sendepende de ĉia politika intereso aŭ kontrolo. [. . .] Tiu ĝenerala bildo de foresto de armiloj kaj de trejnitaj trupoj, de malorganizigo kaj de konfuzo reflektis la mankon de milit-preparo flanke de la araboj de Palestino en la periodo antaŭ 1948.”*¹² Mallonge, necesis la iom-post-ioma enŝoviĝo, ekde

10 Michel Bar-Zohar, *Ben Gourion*, Fayard, Parizo, p. 235-236.

11 Benny Morris, *The Birth...*, verko cit., p. 20

12 Saml., p. 23.

januaro 1948, de la Armeo de Liberigo de Fawzi Al-Quawuqji por doni minimuman ofensivo-forton al la araboj de Palestino: ĝi konsistis el 3.830 volontuloj meze de majo, armitaj per dekmilo da ofte malnovaj fusiloj, aldone al la 2.618 fusiloj pri kiuj disponis la palestinaj fortoj – 1.055 en la kamparoj kaj 1.563 en la urboj¹³...

Konkludo de Benny Morris en 1948 and After: „Dum la unua fazo de la milito, de decembro 1947 ĝis la 14-a de majo 1948, kiu estis miksaĵo de gerilo kaj de interna milito, [la judoj estis], dum preskaŭ ĉiuj decidaj bataloj, pli multnombraj, pli bone armitaj kaj pli bone trejnitaj ol iliaj kontraŭuloj. [...] Kiam venis la testo, dum la ofensivoj de la Hagana en aprilo kaj komence de majo, la palestinaj eksterregululoj (kaj la „volontuloj“) senrezistiĝis kaj fuĝis, iliaj fortikaj urboj – la koridoro al Jerusalemo, Tiberiado, Hajfo, Safed, Orienta Galileo – falis unu post la alia, rapide, kvazaŭ domentabuletaro. Se aldoni la superan motivadon de la Jihuf – tio okazis apenaŭ tri jarojn post la holokaŭsto, kaj la trupoj de la Hagana sciis ke ili batalis por sia supervivado –, ĉiu povas vidi ke la palestinanoj havis nenian ŝancon.”¹⁴

En sia *Naskiĝo de Israelo*, Simha Flapan insistis ankaŭ pri la nekapablo de la Husseini kaj de la Alta Araba Komitato varbi la palestinanojn por sia sankta milito kontraŭ la dividopiano. „La AAK ne ĝuis amasan popolan subtenon, skribis la eksa respondeculo de la Mapam, kaj kiam, sekve al la rezolucio de la Unuiĝintaj Nacioj, la muftio de Jerusalemo rekrutis volontulojn por sia Armeo de Sankta Batalo, la plimulto de la palestinaj araboj rifuzis respondi. Fakte, antaŭ la unuflanka sendependec-deklaro de Israelo, multaj palestinaj gvidantoj kaj grupoj volis havi nenion komunan kun la muftio kaj lia politika partio kaj faris diversajn klopodojn por atingi provizoran kompromison kun la cionistoj. Sed la profunda rezisto de Ben Gurion al starigo de palestinaj ŝtato reduktis signife la oponadon al la militeca politiko

13 Kp Elias Sanbar, *Palestine 1948. L'Expulsion*, Les livres de la Revue d'études palestiniennes, Parizo, 1984, p. 150 ĝis 152.

14 Benny Morris, *1948...*, verko cit., p. 14.

*de la muftio.*¹⁵ Post memoriĝi la historion de la palestina nacia movado, la terurajn perdojn kiujn ĝi suferis dum la subpremo de la granda ribelo de 1936-1939 kaj ĝiajn persistajn dividojn, Flapan emfazis la gravecon de la fortoj alternativaj al la Husseini, kiuj iris de demokratoj kiaj Musa Al-Alami ĝis la komunistaj aktivuloj de la Ligo de Nacia Liberigo. Tamen, *„kvankam ekzistis notinda opozicio al la muftio kaj al ties subtenantoj inter la palestinanoj, estis kvazaŭ memmortige por ĉia palestina gvidanto publike kontraŭi la absolutan kaj furiozan rifuzon, kiun la AAK montris kontraŭ la divido. Tia pozicio estus konsiderata kiel perfido”.*¹⁶

Fortigita de la sangaj agresoj de la Irgun kaj de la Lehi, la bolado de la spiritoj tamen ne kaŭzas amasan rekrutiĝon. Tiel, ke la 14-an de marto 1948 David Ben Gurion faris jenan analizon: *„Estas nun klare, kaj nekontesteble, ke, se ni alfrontus nur la palestinanojn, ĉio irus plej bone. La grandega plimulto de ili ne volas kontraŭbatali nin, kaj ĉiuj kune estas nekapablaj rezisti al ni, eĉ en la nuna stato de nia organiziteco kaj de nia ekipaĵo.”*¹⁷

Koncerne la duan fazon de la milito, la „malnovaj” historiistoj volonte emfazis la periodon de la 15-a de majo ĝis 11-a de junio 1948, dum kiu la situacio de la israelaj fortoj ŝajnis al ili malfacila, apenaŭ tenebla kaj eĉ malesperiga. Kaj, fakte, dum la unuaj tagoj, la judaj fortoj ŝajnis en defensivo: libananoj kaj sirianoj atakas forte en la nordo; la egiptoj izolas plurajn kibucojn en la Negevo, prenas Berŝebo kaj avancas al Tel-Avivo, kies bus-stacidomon ilia aerarmeo forte bombadis; la Araba Legio regajnas spacon en Jerusalemo. En 1960, en sia jam citita libro, Jon kaj David Kimche taksis ke en la mateno de la 15-a de majo 1948, nur 19.000 israelaj soldatoj alfrontis la 23.000 arabajn invadintojn, kaj tiuj ĝuis krome *„superan pafpovon”*.¹⁸ Sed ĉu ili, per tio, ne subtaksis la judajn fortojn? Laŭ David Ben Gurion mem¹⁹, la

15 Simha Flapan, verko cit., p. 58.

16 Saml., p. 67-68.

17 Citita de Simha Flapan, verko cit., p. 73.

18 Jon kaj David Kimche, verko cit., p. 162.

19 David Ben Gurion: *War Diaries*, Tel-Avivo, 1982, p. 428.

Hagana vicigis tiun tagon 30.574 soldatojn, de kiuj 40 % armitajn – sen kalkuli la proksimume 5.000 milicanojn de la Irgun kaj de la Lehi. De unu divizio fine de 1947, la Hagana – tion rekonas ĝia oficiala historio²⁰ – pasis al dek meze de majo 1948, kun unuoj de artilerio, de blenditaj veturiloj kaj kun embrio de mar- kaj aer-armeo.

Eĉ Dominique Lapierre kaj Larry Collins, ne tre suspektaj pri por-arabaj simpatioj, rekonas en sia fama *Jerusalemo ke ĵus antaŭ la milito, „sur la papero, la situacio de la judoj ne estis tiel malesperiga kiel ŝajnis. La Hagana povis apogi sin sur 60.000 homoj milite instruitaj. Triono de tiuj soldat-civitanoj estis akirintaj sian sperton en la Juda Brigado aŭ en ia alia armita forto dum la Dua Mondmilito. 28.000 enmigrintoj, plejparte en armea aĝo, atendis en la anglaj reten-tendaroj de Kipro ke la ŝipoj transportu ilin al Palestino tuj post la fino de la mandato. Aliaj, dum tiu 12-a de majo, estis jam survoje en plenŝtopitaj ŝipoj venantaj de Eŭropo”. Tamen, precizigas ili, „nur 20.000 de la milite instruitaj 60.000 judoj estis mobilizitaj [pro] manko de armiloj. Al la 10.000 fusiloj, kiuj konsistigis ilian bazan armaĵon, estis ĵus aldonitaj 4.500 fusiloj aĉetitaj de Ehud Avriel en Ĉeĥoslovakio kaj 7.000 mitraloj fabrikitaj en la sekretaj laborejoj de Haim Slavin. Spite al ĝia malforteco, tiu malpeza armilaro estis trezoro apud la malabundo de pezaj armiloj. [. . .] Ekzistis eĉ ne unu batal-aviadilo en la tuta lando. La laborejoj de Joseph Avidar kovris per blendo-tabuloj proksimume 600 ĉiaspecajn veturilojn, sed, kvankam ili donis realan protekton sub la kugloj de la embuskoj, ili estus nur rul-ĉerkoj antaŭ la kanonoj de Glubb aŭ la egiptaj blenditaj veturiloj”.*

Tamen, Lapierre kaj Collins aldonis: *„Sur la labortablo de Ben Burion, du dosieroj enhavis la solajn motivojn por obstine kredi je la venko, kaj la ĉefajn argumentojn kiuj konvinkis eble liajn kompanojn proklami la ŝtaton. En tiuj dosieroj troviĝis la listo de armiloj aĉetitaj eksterlande [. . .]. Provizore stokitaj en Eŭropo atendente ke la suvereneco de la juda ŝtato ebligu survojiĝi ilin laŭleĝe al Palestino, tiuj armiloj*

²⁰ Yehuda Slutzky, *Sefer Toldot Hahagana*, Tel-Avivo, 1972, vol. 1, p. 12.

povis ŝanĝi la situacion de la konflikto.”²¹

Al tiuj konsideroj pri la ĉeestaj fortoj necesas aldoni la totalan foreston de kohera plano flanke de la invadintoj. En *Collusion Across the Jordan*, Avi Shlaim insistas pri tiu punkto: „La israelanoj – skribas li, citante historiiston de la Araba Ligo – diris poste ke ili sciis pri araba «tutaĵa strategio», kombinanta [tiujn] de ĉiuj arabaj armeoj. Tia strategio ne ekzistis, kaj ne estis la plej eta provo prepari ian. [...] La tiel nomata strategia plano ellaborita de la Araba Ligo estis amatora laboraĵo, ĝis ekstreme malprofesia. Laŭ armea termino, tio tute ne estis plano.” Kaj Shlaim konfirmis: „La amatorismo kiun montris la arabaj politikistoj el operacia vidpunkto estis absolute egaligita de tiu de la arabaj militistoj, de kiuj certaj kunigis la plej malbonajn malvirtojn de la du grupoj: la tendenco de la politikistoj pompe trumpeti la rajtojn de la araboj sen konsideri la fortrilatojn, kaj la tendenco de la oficiroj lasi sin deturni de siaj veraj taskoj per la politikaj intereso kaj konsideroj”.²²

La armiloj de Okcidento, la armiloj de Oriento

Supozite ke, la 15-an de majo 1948, la Hagana troviĝis vere en malcerta situacio, tiu malkomforta pozicio ĉiukaze ne daŭris longe. Tre rapide la helpo de novaj enmigrintoj kaj la amasa alfluo de armiloj el Okcidento (tra la fine malfermitaj havenoj) kiel el Oriento – danke al la permanenta aerponto provizanta Israelon ekde la ĉeĥa bazo de Zatec²³ –

21 Dominique Lapierre kaj Larry Collins, *Jérusalem*, Robert Laffont, Parizo, 1971, p. 374.

22 Avi Shlaim, *Collusion Across the Jordan. King Abdullah, the Zionist Movement, and the Partition of Palestine*, Clarendon Press, Oksfordo, 1988, p. 198.

23 Inter la 20-a de majo kaj la 11-a de aŭgusto 1948, pli ol cent flugoj alportis fusilojn, kartoĉojn, mitralojn, kanonojn kaj haŭbizojn, sen forgesi la aviadilojn Messerschmitt kaj Spitfire, kiuj ebligis al la israelanoj, la 29-an de majo, haltigi la egiptojn avancintajn ĝis 30 kilometrojn de Tel-Avivo (Vd Dominique Vidal, „Moscou et la Palestine 1945-1955”, *Revue d'études palestini-*

radikale modifis la fortrilatojn. Tiom ke, ekde meze de julio, ĉio ŝanĝiĝis. „*La batalhalto, klarigis ekzemple jam 1960 Jon kaj David Kimche, transformis la militan situacion. [. . .] La israelaj armitaj fortoj pasis de 20.000 al 60.000 homoj. La arabaj armeoj ankaŭ plimultigis siajn trupanojn, sed ne al la sama nivelo: ili havis nun 40.000 homojn en Palestino. Ankoraŭ pli frapa estas la ŝanĝo pri armiloj. [. . .] La israela ekipaĵo havis jam nenion por fari kun tio kia ĝi estis monaton antaŭe. Ili havis nun tankojn, artilerion, multajn haŭbizojn kaj sufiĉe da malpezaj armiloj.*”²⁴

Surbaze de siaj esploroj en la arĥivoj, Benny Morris, en 1948, estas ankoraŭ pli tranĉa. „*La malnova historiografio, skribas li, ne estas pli klariga pri la dua duono de la milito, pri la konvenciaj bataloj [kiuj okazas] inter la 15-a de majo 1948 kaj januaro 1949. La organiziteco, la komando kaj la majstreco de la judoj [. . .] estis larĝe superaj al tiuj de la armeoj, sen kunordigado, de Egipto, de Sirio, de Irako kaj de Libano; kaj, de unu flanko ĝis la alia, la Hagana, poste la Defendo-Fortoj de Israelo superis nombre. Ekzemple, meze de majo, la Hagana havis surloke proksimume 35.000 armitojn kontraŭ 25.000 – 30.000 por la arabaj armeoj. En la tempo de la operacio Dani, en julio, la Defendo-Fortoj de Israelo nombris 65.000 armitojn kaj proksime de decembro ĉirkaŭ 90.000 – do en ĉiu etapo signifan superecon super la arabaj armeoj kiuj kontraŭis ilin en Palestino. Kaj, kompare kun la mallongaj komunikad-linioj de la Hagana kaj de la Defendo-Fortoj de Israelo, la helpoj kaj provizoj de la egiptoj kaj irakanoj devis veni tra centoj da kilometroj en dezerto antaŭ ol atingi la frontliniojn.*” Certe, rekonas Benny Morris, de la 15-a de majo ĝis la 11-a de junio 1948 la arabaj armeoj havis la avantaĝon koncerne armilojn: „*La Hagana estis multe pli malforta en la aero, ĝi havis kvazaŭ neniun artilerion (nur pezajn haŭbizojn), malmultajn tankojn kaj ĉenveturilojn. Dum tiuj tri semajnoj, tio estis «fifty-fifty», kiel la operaci-ĉefo, Yigal Yadin, deklaris al la politika direktoro de la Jiĥuf la 12-an de majo. Tiam, la supera motiviteco de la judoj, ilia kuraĝo kaj ilia animforto faris la diferenc-*

ennes, Parizo, n-ro 28, somero 1988).

24 Jon kaj David Kimche, verko cit., p. 223-224.

on.”

Pri la demando de armiloj, la historiisto precizigas: *„La «malnovaj historioj» emas insisti peze pri la konstanta malabundo de armiloj kaj de municioj de la Hagana kaj de la Defendo-Fortoj de Israelo, grandparte pro la embargo pri okcidentaj armiloj kiu frapis la judan ŝtaton. La dokumentoj pri 1948 kiuj troviĝas en la ŝtatarĥivoj de Britio kaj de Usono kaj la «novaj historioj» emas ekvilibrigi tiun juĝon per la seriozaj problemoj kiujn spertis la arabaj ŝtatoj por aĉeti armilojn kaj municiojn. Ankaŭ ili suferis severe intermitajn aŭ konstantajn embargojn kaj malfruigojn de liverado pro politikaj motivoj. Ekzemple, unu el la kialoj pro kiuj la transjordanianoj, en julio, perdis Lidda-on kaj Ramleh-on kaj ne sukcesis repreni ilin estis grava manko de obusoj. Aldonindas ke la Jiĥuf, kontraste al la palestinaj araboj kaj al la ĉirkaŭaj arabaj ŝtatoj, havis relative progresintan kapablon de armilproduktado, eĉ se tiu estis reduktita. Tiel, en oktobro 1947 kaj julio 1948, la fabrikoj de la Hagana produktis 3 milionojn da kugloj de 9 mm, 150.000 granatojn, 16.000 fusil-mitralojn Sten kaj 210 3-colajn haŭbizojn.”*²⁵

Longdata koluzio

La supereco de la Jiĥuf estas do milita, sed ankaŭ kaj precipe politika. Ĉar, anstataŭ formi unuecan kaj motivitan blokon, ĝiaj kontraŭuloj estas profunde dividitaj. Tio estas la kazo de la palestina nacia movado, amase pereigita de la subpremo de la granda ribelo de 1936 –1939. Ĝia gvidado estas akaparita de la klano Hussein, kies ĉefo antaŭ nelonge revenis de Berlino kie, dum la Dua Mondmilito, li estis publike defendinta la naziojn kaj eĉ organizinta islamajn SS-diviziojn (esence bosniajn-kroatajn) – *„La araboj, deklaris li al la Führer la 28-an de novembro 1941, estas la naturaj amikoj de Germanio, ĉar ili havas la samajn malamikojn, la anglojn, la judojn kaj la komunistojn.”*²⁶ Krome, la ad-

²⁵ Benny Morris, 1948..., verko cit., p. 14-16.

²⁶ Citita de Walter Laqueur kaj Barry Rubin, {The Israel Arab Reader}, Penguin Books, Londono, p. 79-84.

ministracio de la muftio estas kontestata de aliaj familioj, unuavice de tiu de la Naŝaŝibi. Sed la tensioj inter palestinaj frakcioj estas nenio kompare kun tiuj kiuj dividas la arabajn ŝtatojn. La usona ŝtatsekretario George Marshall tiam ja notis tion, li insistis ĉe siaj diplomatoj pri „*la internaj malfortoj de multaj arabaj landoj pro kiuj por ili malfacilas agi*”, elvokante nome „*la ĵaluzojn inter Saud-Arabio kaj la sirianoj unuflanke, la haŝemitaj registaroj de Transjordanio kaj de Irako aliflanke, [kiuj] malhelpas la arabojn plej bone uzis siajn ekzistantajn fortojn*”.²⁷ La usona ambasadoroĉe la UN, Warren Austin, siavice taksis la 8-an de majo 1948 ke la interveno de la arabaj landoj havos „*neglektindan gravecon*” – escepte de tiu de Transjordanio pri kiu la britoj, raportas li, pensas ke ĝi ludos stabiligan rolon en la mezuro laŭ kiu ĝi strebas nur realigi „*efektivan dividon de Palestino kun la juda ŝtato*”.²⁸

Jen kuŝas efektive la ŝlosilŝtono de la milito de 1947 – 1949, sen kiu nenio, en tiu, ŝajnas komprenebla. Se la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj decidis, la 29-an de novembro 1947, dividi Palestinon en judan ŝtaton kaj araban ŝtaton (krome zonon de „aparta internacia reĝimo” por Jerusalemo), estas pri alia divido pri kiu Golda Meyerson (estonta Meir) kaj la reĝo Abdallah – tiu kun la beno de Londono – neformale interkonsentis dek-du tagojn antaŭe: la juda ŝtato ja estiĝos, sed ne la araba ŝtato, kies plej granda parto estos okupata de la Araba Legio kaj aneksita de Transjordanio. Preparita de la longdataj rilatoj de la cionista movado kun la ŝerifo Hussein de Mekko kaj ties posteuloj – nome lia filo, Abdallah, kiel ankaŭ kun lia pranepo, la reĝo Hussein, kaj lia prapranepo, la nuna reĝo Abdallah –, tiu kompromiso donas egan avantaĝon al la judoj kaj samtempe akrigas la dividojn inter araboj. Ĉar, sen esti informitaj pri la „perfido” de la reĝo Abdallah, la aliaj kontraŭuloj de la estonta juda ŝtato antaŭsentas ĝin kaj faras ĉion por malhelpi la Haŝemitojn akapari Palestinon. Tiel, la 15-an de majo 1948, la arabaj armeoj ekmilitas same kontraŭ Abdallah kiel fronte al Israelo. Egiptio decidas nur tre malfrue

27 Simha Flapan, verko cit., p. 191 kaj 192.

28 Saml., p. 192.

partopreni en la operacioj, esence por kontraŭagi la Haŝemitajn ambiciojn. Se ĝi ne estis ignorata de la historiistoj, tiu „kaŝita flanko” de la unua israela-araba konflikto estis tamen longan tempon subtaksata – ĝis la esploradoj de Avi Shlaim.

„Du signifaj konkludoj, skribas dekomence la historiisto, aperas el la reekzamenado de la historio de la israela-araba konflikto fine de la 1940-aj jaroj, konsidere la haŝemitan-cionistan konekton. La unua viktimo kaj la plej grava estas la ideo laŭ kiu, en la momento de sia naskiĝo, la ŝtato Israelo estis alfrontita al unubloka araba mondo nefleksiĝema en sia malamo kaj fanatika en sia determino forstreki ĝin el la mapo de Proksim-Oriento. [. . .] La dua grava viktimo estas la nocio de araba unueco tiel kara al la koro de la arabaj naciistoj. [. . .] Mallonge, la haŝemita-cionista konekto estas unu el la ŝlosiloj por kompreni kiel Palestino estis dividita, kaj kial la palestina nacia movado ricevis tiom katastrofan malvenkon dum la juda nacia movado realigis sian ambicion starigi sendependan judan ŝtaton sur esenca parto de Palestino.”²⁹

Por la reĝo Hussein de Jordanio, Abdallah, lia avo, „estis perceptinta la amplekson de la cionista glacimonto, dum aliaj vidis nur ties ekstremajon. [. . .] Lia strategio kaj liaj taktikoj konsistis do en ĉirkaŭiri kaj minimumigi la eblajn sekvojn de plenfrapa kolizio. [. . .] La respondoj de la aliaj estis ekscesa konfido, nefleksiĝemo kaj totala memkontenteco”.³⁰ Kion la monarĥo de Amano „forgesis” indiki, estas la profitoj kiujn lia antaŭulo esperis tiri – koste de la palestinanoj – el siaj rilatoj kun la cionistaj gvidantoj, kaj tion jam delonge. Laŭ la impeto de la interkonsento farita de lia frato, Faisal, kun Haim Weizmann, la 3-an de januaro 1918, Abdallah, apenaŭ proklamita emiro de Transjordanio, proponas al la cionista gvidanto, en 1922, daŭrigi la interparoladon. Dum la tutaj 1920-aj kaj 1930-aj jaroj li daŭrigas la dialogon kun la sinsekvaj respondeculoj de la Juda Agentejo: la kolonelo Frederik Kisch, poste Haim Arlozorof kaj, post

²⁹ Saml., p. 18-19.

³⁰ Citita de Avi Shlaim, verko cit., p. 41.

ties murdo, la 16-an de junio 1933, Moŝe Ŝertok. La kunlaborado estas unue ekonomia: koncesioj por judaj kompanioj ĉe la bordo de la Morta Maro (kalio) kiel en Naharajim (elektra centralo), kaj la emiro akceptas eĉ, en januaro 1933, ludoni 7.000 hektarojn da transjordanian tereno – Londono klopodas malhelpi la aplikadon de tiu interkonsento, pro timo de arabaj reagoj. Sed la interŝanĝo fariĝas iom post iom politika.

Paradokse, la palestina ribelo, kiu eksplodas en 1936, servis la interesojn de la emiro, kiu cetere faris ĉion por ĉesigi ĝin. Nomumita en aŭgusto 1936, la brita komisiono Peel faris fine de julio 1937 unuan proponon de divido de Palestino: 5.000 km², en la nordo kaj la okcidento de la lando, estu donotaj al la judoj por ke ili tie fondu sian ŝtaton, dum la reston akiru Transjordanio, kaj interŝanĝo de loĝantaro faciligu la dividon. Oficiale la cionista movado kontraŭas solvon kiu koncedas al ĝi nur 15 % de Palestino – en aŭgusto 1937, la 20-a Cionista Kongreso, kunveninta en Zuriko, rifuzas la konkludojn de la Komisiono Peel, sed... permesas la daŭrigon de la intertraktadoj kun la mandata potenco. Private, Londono kiel Amano scias ke la starigo de juda ŝtato, ne ĝia surfaco plej gravas por Ben Gurion kiel al Weizmann: „*La reĝlando de Davido estis pli malgranda, skribas Weizmann. Sub Salomono ĝi fariĝis imperio. Kiu scias?*” Gravas la unua paŝo!³¹ Sed la perspektivo de divido malproksimiĝas kun la relanĉo de la palestina ribelo: la emiro Abdallah revenas al sia ideo de Unuiĝinta Araba Reĝlando en kiu la judoj ĝuus memregistaron (proponoj en dek-du punktoj de majo 1938), kaj Ŝia Gracia Moŝto inklinas al sendependeco de unueca Palestino, kaj plejmulte araba, en la venontaj dek jaroj – jen la jam menciita Blanka Libro de la 17-a de majo 1939.

17-a de novembro 1947: la alia divido

„La plej bona unuiga faktoro, notas Avi Ŝlaim, estas kom-

³¹ „Saml., p. 58 [franclingve en la teksto: „C'est le premier pas qui compte!"]].

una malamiko, kaj Abdallah kaj la judoj havis komune ne unu, sed du malamikojn: Hitleron kaj la muftion."³² Fakte, dum la Dua Mondmilito reokazas la kontaktoj inter la Juda Agentejo – reprezentata de Moŝe Ŝertok kaj Elias Sasson, la ĉefo de la araba sekcio de ĝia Politika Departemento – kaj le emiro. Post la milito, tiu fariĝas la monarĥo de la Haŝemita Reĝlando de Jordanio, formale sendependa la 22-an de marto 1946. La 4-an de aŭgusto, farante strategian turniĝon (vidu la ĉapitron I), la Plenumkomitato de la Juda Agentejo deklaras sin „*preta diskuti pri propono celanta stariĝi vivkapablan judan ŝtaton en taŭga parto de Palestino*".³³ Ok tagojn poste, Abdallah ripetas sian oferton al la Juda Agentejo: aŭ federacion malferman al juda enmigrado, aŭ dividon kun aneksado de la araba parto al Transjordanio. Prenante Sasson-on ĉe la brako, fine de ilia renkontiĝo, la emiro konfidis al li: „*Mi havas sesdek-ses jarojn. Miaj jaroj estas kalkulitaj. Vi havas ne unu realisman gvidanton kiel min en la tuta araba mondo.*"³⁴ Dum tuta jaro, Abdallah manovris inter la Araba Ligo, la britoj, la Juda Agentejo kaj sia propra registaro, sen heziti uzadon de duobla – eĉ triobla – lingvaĵon, sed sen tamen iam ajn devojiĝi de sia projekto. Ŝlaim estas nekontestebla: „*Ĉe pli detala esplorado, la komprenebla, sed supraĵa interpretado, laŭ kiu, ekde la fino de la Dua Mondmilito ĝis 1947, la Granda Sirio estis la absoluta prioritato de Abdallah, kaj ke en 1947 li rezignis pri ĝi por akiri parton de Palestino por sia reĝlando, fariĝas pli kaj pli netenebla. La densa rilato inter la du celoj, samtempe en la politiko de Abdallah kaj en la percepto kiun havis liaj kontraŭuloj de ĝi, igas arbitra ĉian provon tempe disigi ilin.*"³⁵

Tamen: en tiu epoko la intencoj de Abdallah estas tute ne evidentaj. Al la senditoj de la Juda Agentejo li ripetas ke li akceptas la naskiĝon de Israelo se li povas akiri la araban ŝtaton. Akceptante la prezidanton de la UNSCOP en Amano en julio 1947 la reĝo asertas male ke „*estus malfacile por la*

32 Saml., p. 71.

33 Citita de Michael J. Cohen, *Palestine and Great Powers, 1945-1948*, Princeton University Press, 1982, p. 145.

34 Citita de Avi Shlaim, verko cit., p. 78.

35 Saml., p. 87.

araboj akcepti judan ŝtaton eĉ sur parto de Palestino".³⁶ Sed li sendas trankviligan mesaĝon al la brita ministro pri eksterlandaj aferoj, Ernes Bevin: transe de taktikaj diskursoj, Transjordanio deziras dividon kiu garantias al ĝi la araban Palestinon. Aliflanke, al la Politika Komitato de la Araba Ligo, kunveninta en Libano meze de septembro, la transjordania ĉefministro voĉdonas por la rezolucio kiu rekomendas la sendependecon de Palestino kaj avertas kontraŭ la stariĝo de juda ŝtato prezentata kiel kondukanta neeviteble al eksplodo de perforto en Proksim-Oriento. Tamen, precizigas Ŝlaim, „*ekde la komenco, la sinteno de Transjordanio konsistis el skeptikeco kaj ekstrema hezitemo kunlabori surbaze de komunaj planoj de arma interveno en Palestino*".³⁷ Por Abdallah, la uzo de lia Araba Legio povas havi nur unu celon – la regadon de la teritorio asignita de la Unuiĝintaj Nacioj al la araba ŝtato de Palestino kun la perspektivo de ĝia aneksado al la reĝlando – kaj devas do esti kunordigata – kun la Juda Agentejo. Ties intereso, montras Avi Ŝlaim, kovriĝas kun tiu de la reĝo. La cionistaj gvidantoj atendas invadon de la arabaj armeoj kaj scias ke, tiukaze, „*la transjordania armeo estus la ĉefa minaco por ilia sekureco. [...] Krom la militaj konsideroj, kiuj igis ilin voli neŭtraliĝi la Araban Legion dum la venonta alfrontiĝo, [ili] havis gravajn politikajn kialojn por rigardi en direkto de Amano. La problemo kun sendependa palestina ŝtato apud la juda ŝtato, tia kian planis la UNSCOP, estis ke tiu ŝtato estus neeviteble gvidata de la muftio kaj de liaj amikoj de la Alta Araba Komitato, kies profunda malamikeco al la cionismo kaj al la judoj ekskludis ĉian ŝancon de kompromiso. Abdallah estis la sola realisma politika alternativo al la muftio.*”³⁸

Komence de septembro 1947, la reĝo sciigis al Sasson ke li pretas subskribi interkonsenton pri la divido de Palestino kun starigo de juda ŝtato kaj aneksado de la resto al Transjordanio. Tio estas en substanco, sed en malpli oficiala formo, la kompromiso kiun faris, dum sia renkontiĝo de la 17-a de novembro en Nahrajim ĉe la bordo de Jordano, Abdallah

36 Saml., p. 92.

37 Saml., p. 100.

38 Saml., p. 107.

kaj Golda Meyerson. Tiel, resumas Avi Ŝlaim, *„fine de 1947, estis naskitaj du dividoplanoj – kaj ne unu: unu estis naskita en Novjorko la 29-an de novembro 1947, kun la oficiala sigelo de la internacia komunumo kaj alvokanta al kreado de du sendependaj ŝtatoj anstataŭantaj la britan mandaton en Palestino; la alia, konceptita sekrete en Naharajim, frukto de profana alianco inter la cionistoj kaj la Haŝemitoj, celis la kreadon de unu sola ŝtato kaj la aneksadon de la resto de Palestino al Transjordanio. [. . .] La juda komunumo de Palestino estis la ĉefa profitanto de la du planoj. [. . .] La Alta Araba Komitato kaj la plimulto de la arabaj ŝtatoj estis necedigeble kontraŭ la unua kaj suspektemaj, eĉ malamikaj, rilate al la dua. [. . .] La reĝo Abdallah siavice, se li gajnis nenion ĉe la aplikado de tiu plano, li estis la ĉefa araba profitanto de la alternativa plano de devido de Palestino kun la judoj.”*³⁹ Des pli, kiam li akiris, post semajnoj da traktadoj, la benon de Londono.

Ankaŭ pri tiu punkto la „novaj historiistoj” disiras de siaj antaŭuloj, kiuj prezentis Brition kiel komplotanton kontraŭ la starigo mem de Israelo. Ne, pravas Avi Ŝlaim kaj Ilan Pappé, apogante sin sur arĥivoj: tion rifuzis la britoj, komence de 1948, ne estis juda ŝtato, sed la araba ŝtato, kiun ili volis aneksi al sia fidela Transjordanio. Kaj, fakte, la 7-an de februaro 1948, Ernest Bevin akceptas la transjordanian ĉefministron, Taŭfik Abdul Huda, en la Foreign Office. Informita de tiu pri la planoj dismeti la Araban Legion post la brita retiriĝo, la ministro pri eksterlandaj aferoj – laŭ la raporto de la generalo John Glubb, la (brita) komandanto de la Araba Legio ĉeesta dum la interparolado – kontentiĝas diri: *„Tio ŝajnas al mi evidentaĵo farenda.”* Post tio li aldoas: *„Ne invadu la regionojn atribuitajn al la judoj.”* Lia interparolanto respondas simple: *„Ni ne havus la fortojn por fari tion, eĉ se ni dezirus tion”*⁴⁰. . . Kontraŭa al ĉia makiaveleca rolo ludata de la britoj en tiu periodo, Avi Ŝlaim taksas ke „kvietata divido de la lando inter Abdallah kaj la judoj estis, el brita vidpunkto, alte dezirinda solvo. [. . .] Tio estis la ĝenerala politiko de la laboristpartiaj ministroj kuraĝigi Abdallah-on

39 Saml., p. 121.

40 Citita de Avi Ŝlaim, verko cit., p. 136.

atingi interkonsenton kun la judoj”.⁴¹

Sed la eventoj, kiel konate, neniam evoluas tiel kiel planite. Precipe en tempo de milito. En la semajnoj antaŭ la alfrontiĝo, okazas ke la unuoj de la Araba Legio apogas la palestinajn milicojn. Aliaj partoprenas en atakoj kontraŭ la judaj fortoj, en antaŭurbo de Jerusalemo, poste kontraŭ la kibucoj Geŝer (en juda zono) kaj ĉefe Kfar Ecion (en araba zono). „Ĉio ĉi kaj la oftaj deklaroj de Abdallah laŭ kiuj li sendos sian armeon por protekti la arabojn de Palestino kontribuis al la juda percepto ke la Legio forlasis sian antaŭan neŭtralecon.”⁴² La reĝo vane ripetas siajn certigojn, la cionistaj gvidantoj pli kaj pli dubas pri ili, des pli ke li rifuzas doni sian promeson skribe. Londono gravigas la konfuzon rifuzante informi la usonanojn pri la enhavo de la pintkunveno de la 7-a de februaro inter Bevin kaj Abdul Huda: Vaŝingtono, kaj do Tel-Avivo, ne scias ke Amano formale promesis ne transiri la limojn de la juda ŝtato, sub minaco tuj perdi la financadon, armil-provizadon kaj kadrojn liveritajn de Britio. Ŝajnas esenca ankaŭ la malsukceso de la lastŝanca pintkunveno, la 10-an de majo 1948 en Naharajim, inter Abdallah kaj Golda Meyerson, de kiu ŝi revenas konvinkita ke la reĝo forneis sian promeson de novembro. Cetere ankaŭ tie Avi Ŝlaim serioze pridemandas la „ortodoksan” interpretadon de la okazo emfazante samtempe la eksterordinaran diplomatian mispaŝon kiu konsistis en la elekto de tiu nefleksebla virino kaj la eraran analizon kiun ŝi faris de la politiko de Abdallah. Laŭ multnombraj observantoj kaj fakuloj, la reĝo volis neniel engaĝi sian Legion trans Jerusalemo kaj Cisjordanio – sed Golda Meyerson, ironias Ŝlaim, „*tre emis vidi ĉion nigra-blanka; ŝi estis klare fermita al provizoraj solvoj kaj al malrektaj taktikoj*”.⁴³

Restas, ke la 15-an de majo, tuj post la proklamo de la ŝtato Israelo, la arabaj armeoj eniras Palestinon, sub la premo de la superekscititaj opinioj – „*Ni devas invadi*, konfidas tiam la siria ministro pri eksterlandaj aferoj al la usona ambas-

41 Saml., p. 163.

42 Saml., p. 169.

43 Saml., p. 214.

doro, *alie la popolo mortigos nin.*"⁴⁴ La fakto, ke la armeo de Abdallah partoprenas en la invado, signas, por Ben Gurion, la rompon de la interkonsento sekrete farita ses monatojn antaŭe. Se, emfazas Ŝlaim, *„la espero, eĉ malpreciza, je interkonsento inter Abdallah, estis konstanta en la menso de Ben Gurion, kiam la Legio eniris Palestinon, oni agis senretene, almenaŭ komence. Iom poste, dum la milito, Ben Gurion kaj Abdallah donis la impreson fari pli limigitan strategion unu al la alia, sed la kialoj de tiuj strategioj estis multe tro kompleksaj por esti klarigeblaj per nocioj de komplotoj, de koluzioj kaj de «grandaj planoj»*."⁴⁵ La faktoj, tamen, ekzistas. Dum la tuta milito, la Araba Ligo neniam enpenetris la teritorion de Israelo. Male okazas kun la inverso: la judaj fortoj akaparas Lidon [Lydda] kaj Ramlehon [Ramleh], provas preni Latrunon [Latroun], okupas Galileon kiel la Negevon kaj iras suden eĉ ĝis la Ruĝa Maro. Sed maloftas la veraj alfrontiĝoj kun la Araba Ligo, escepte de Latruno kaj ĉefe la bataloj pri la regado de Jerusalemo, kiu ne estis parto de la teritorioj atribuitaj al la juda ŝtato kaj, pro tio, ne aperis en la interkonsento Abdallah-Meyerson de la 17-a de novembro (*vidu ĉapitron VIII*). Malgraŭ ripetaj ofensivoj de la israelaj fortoj, la tuta malnova urbo de Jerusalemo – inkluzive de la juda kvartalo, kiu falas la 28-an de majo 1948 – restis cetere en la manoj de la Araba Ligo. Mallonge, se tiam oni evidente ne povas plu paroli pri „koluzio” inter la juna Israelo kaj Transjordanio – *„La kontakto, memorigas Avi Ŝlaim, estis rompita en majo, kaj ĝi estis rekomencita ne antaŭ kvar monatoj”* –, ekzistas aliflanke *„silenta interkonsento”* celanta *„eviti gravan kolizion inter iliaj armitaj fortoj [...] La distingo, daŭrigas Ŝlaim, ne estas pure semantika. «Koluzio» implicas rektan kaj eksplicitan interkonsenton kaj havas la kromnacion de sekreta kaj malestiminda fiakordo. «Silenta interkonsento», male, povas esti la rezulto de reciproka kompreno de la pensado de la alia, kondukanta al la konsciiĝo ke la kunlaborado inter kontraŭuloj povas esti reciproke avantaĝa sen supozi rekt-*

44

45 Saml., p. 238.

an kontakton aŭ eksplicite formulitan agoplanon.”⁴⁶

Kiam Abdallaj forlasas Faruk-on

Ekde la 3-a de aŭgusto, ĉiuokaze, israelanoj kaj transjordanianoj rekontaktiĝas: la ambasadoro de Transjordanio en Londono, Amir Abdul Majid Haidar, venas Parizon por renkonti Elias Sasson, taskitan de Ben Gurion sondi la respondeculojn de la diversaj arabaj landoj. *„La fakto, kribas Ŝlaim, ke Sasson dediĉis multon de siaj talentoj kaj de sia energio al restarigo de la rompita ligo kun la reĝo Abdallah ne estis tute hazarda. Ne pli ol la fakto ke, el ĉiuj klopodoj de Sasson, tiu estis la plej rapide kronita de sukceso. La du landoj atingis interkonsenton pri la divido de Palestino en novembro 1947 kaj, malgraŭ ĉiuj miskomprenoj okazintaj poste kaj la milito, la bazo de tiu interkonsento ne estis tute malaperinta.”*⁴⁷

Male: kelkajn semajnon antaŭe, la peristo de la Unuiĝintaj Nacioj, la duko Foke Bernadotte, forlasante la dividoplanon adoptitan de la Ĝenerala Asembleo, esprimis sin por la aneksado de la araba parto de Palestino al Transjordanio – kun, krome, la Negevo, kiun li proponis interŝanĝi kontraŭ Galileo, kiun la judaj fortoj jam plejparte okupis. Pro tio, cetere, Israelo ne ĉesis akapari ĝin: pro tio la unuflankaj rompoj de la batalhalto⁴⁸ kaj la ofensivo kontraŭ la egipta ar-

46 Saml., p. 235.

47 Saml., p. 281.

48 Avi Ŝlaim donas detaliĝon pri la kondiĉoj de la rompo de tiu batalhalto. La israelanoj estis rimarkintaj ke, kiam ili sendis veturilaron por provizi la kibucojn de la nordo de Negevo, konforme al la dispozicioj de la batalhalto, la egiptoj ofte pafis sur ĝi. La 15-an de oktobro ili do sendis veturilaron esperante ke, per la atakantaj egiptaj fortoj, ili ricevus la serĉatan pretekston por rekomenci la batalojn. Sed la armiloj silentis. *„Anstataŭ esti senkuraĝigitaj de la plorinda spektaklo de la egipta pasiveco, la israelaj soldatoj pafis sur unu el siaj kamionoj kaj senmovigis ĝin. Rapide venigita surloken, la observantoj de la Unuiĝintaj Nacioj, vidante la destruitan kamionon, deklaris la egiptajn fortojn kulpaj je rompo de la batalhalto.”* (verko cit., p. 321).

meo, unue la 15-an de oktobro, pote denove la 22-an de novembro 1948. Nu, anstataŭ montri sian solidarecon kun la reĝo Faruk kies trupoj estas atakataj de Cahal, Abdallah la-sis sian Araban Legion senmova. Ne sen certiĝi ĉe Londono ke, kaze de israela atako kontraŭ liaj propraj fortoj, efikos la angla-jordania alianc-traktato – Ernest Bevin efektive avertis sian usonan kolegon George Marshall pri la risko de milito inter Britio kaj Israelo se tiu atakus la Araban Legion.⁴⁹ La neesperitan „donacon” kiun prezentis la transjordan-pasiveco dum la [juda] atako kontraŭ Egiptio kaj la gravan riskon kiun signifus operacio kontraŭ la Araba Legio, David Ben Gurion poste sciis aprezi.

Li devis antaŭe findecidi duoblan debaton. Unue tiun kiun estigas – ankoraŭ en aŭtuno 1949, temas pri Jerusalemo – la partizanoj de „armita solvo”. Ĝis la operacioj de aŭtuno 1948 en Galileo kaj en la Negevo, la ĉefministro estas mem favora al ofensivo kontraŭ la Araba Legio en Cisjordanio: li submetas al la registaro, la 26-an de septembro, tiusencan proponon, kiu estas rifuzita per sep voĉoj kontraŭ ses – „*en la sekvaj jaroj, Ben Gurion prezentis tiun voĉdonon kiel la plej grandan maltrafitan okazon de la milito de 1948*”.⁵⁰ Tio cetere ne malhelpis la leŭtenant-kolonelon Moŝe Dajan, la 19-an de oktobro, lanĉi du batalionojn al atako de la monto Bejt Jala, strategia saltotabulo por konkeri Betlehemon kaj Hebronon – lia malsukceso fariĝis malinstiga. Sed, ekde kiam Galileo kaj Negevo estis sub kontrolo, la situacio ŝanĝiĝis: el strikta armea vidpunkto, la Defendofortoj de Israelo povas ja akapari Cisjordanion kaj Orient-Jerusalemon, sed je kia politika-diplomatia prezo? Ben Gurion timas konflikton kun Britio kaj malboniĝon de la bildo de la juna ŝtato kiu estas tiam kandidato por la Unuiĝintaj Nacioj. Mallonge, la ĉefministro ekhavas, skribas Ŝlaim, la konvinkon ke „la

49 Israelo fakte proksimiĝis al grava incidento kun Britio, kiam tiu, por superrigardi la retreton de la israelaj trupoj el Sinajo en decembro 1948, sendis patrol-aviadilojn de kiuj du estis depafitaj de la juda kontraŭaviadila defendo. La definitiva retreto de Cahal el la egipta teritorio, la 7-an de januaro 1949, ĉesigis la krizon.

50 Saml., p. 309.

*tempo venis por koncentriĝu sur la taskoj de la paco: la zorgoj pri la enmigrintoj kaj ila readaptiĝo, la koloniado de la tero, vivigi la dezertajn regionojn. La Tero de Israelo, diris Ben Gurion, restos ilia ne nur per la milito kaj per la forto de la armeo. Por Ben Gurion, la milito-libro estis fermita – almenaŭ por la momento”.*⁵¹

La dua debato, pli sub la surfaco, ĉi-foje pri la paco, kontraŭstarigas la favorantojn de la „egipta opcio” al tiuj de la „transjordanian opcio”, eĉ de la „palestina opcio”. Ankaŭ tie, longtempe hezitanta, Ben Gurion faris, malrapide sed certe, sian elekton. Eĉ kiam la ĉefministro eksciis, la 15-an de decembro 1949, ke la egiptoj estis pretaj cedi dek pliajn marbordajn kilometrojn al Israelo, „li kontraŭis, skribas Ŝlaim, ĉian endanĝerigon de la intertraktadoj kun Jordanio pro la esence propra graveco de israela-jordanian interkonsento, pro ties rolo por malfermi la vojon al interkonsento kun Egiptio, kaj pro la neceso reciproke subteni sin kun Abdallah kontraŭ la kampanjo celanta la internaciigon de Jerusalemo”.⁵² Ok monatojn antaŭe, dum la viglega debato en la parlamento, pri la israela-jordanian batalhalto, Ben Gurion, akuzita de Menahem Begin subskribi „novan Munkenon”, ekkriis ke „estas preferinde havi judan ŝtaton sen la tuta Tero de Israelo ol la tutan Teron de Israelo sen juda ŝtato. Juda ŝtato, argumentis li, ne estas ebla sur la tutaĵo de la Tero de Israelo aŭ eĉ en sia okcidenta parto se tiu ŝtato devas ankaŭ esti demokratia, ĉar la nombro da araboj tie jam superas la nombron da judoj. Ĉu ili volas demokratian ŝtaton Israelo sur parto de la Tero de Israelo aŭ judan ŝtaton sur la tuta tero kaj la forpelon de ĝiaj arabaj loĝantoj?” Kaj Ŝlaim aldonas: „Kvankam en la fundo de sia koro Ben Gurion aspiris judan ŝtaton sur la tuta Tero de Israelo, li konsideris tion tasko por estontaj generacioj”⁵³

Rekomencita la 9-an de novembro 1948 pere de Elias Sasson kaj Abdul Majid Haidar, la dialogo inter Tel-Avivo kaj Amano kondukis al interkonsento pri batalhalto en Jerusale-

51 Saml., p. 460.

52 Saml., p. 529.

53 Saml., p. 430-431.

mo, decidante la dividon de la urbo inter Israelo kaj Transjordanio, la 29-an de novembro 1948 – precize jaron post kiam la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj decidis la internaciigon. Tiu unua rezulto faciligis la intertraktadon – ŝajne en Rodoso sed fakte rekte en Ŝuneh, la palaco de Abdallah – de la batalhalto kiu definitive ĉesigis (ĝis junio 1967!) la konflikton inter ili. Tio okazis la 3-an de aprilo 1949, malgraŭ lasta israela provoko: la preno de Umm Raŝ-ŝaŝ (la estonta Ejlat) ĉe la Ruĝa Maro, la 10-an de marto. Aliflanke, la intertraktadon pri packontrakto en oficiala formo neniam sukcesis. Akirinte tion kion li el sia vidpunkto konsideris ĉefa – la esencan parton de Cisjordanio kaj la malnovan urbon de Jerusalemo –, Abdallah ne volis spiti sian propran publikan opinion nek tiun de la araba mondo ĝenerale. Li ankoraŭ malpli deziris ke Transjordanio estu ekskludita de la Araba Ligo, aŭ eĉ viktimiĝi je ties bojkoto. Laŭ la granda bedaŭro de Ben Gurion, la reĝo, kiu estis tamen doninta sian principan konsenton por fari interkonsenton pri neagreso, retroiris. Interŝanĝe, la Araba Ligo akceptis la anekson de Cisjordanio, kiu fariĝis oficiala la 24-an de aprilo 1950. Tiu lasta klopodo, per kiu Abdallah esperis tiel videble ne eniri la historion kiel „perfidulo” de la araba kaŭzo, ne ŝparis al li tragikan finon: la 20-an de julio 1951 li falis sursojle de la moskeo Al-Aksa, en Jerusalemo, fare de palestina naciisto.

La 5-an de majo 1949, dum renkontiĝo en Ŝuneh, Abdallah konfidis al Moŝe Ŝarett (la eksa Ŝertok) ke *„ankaŭ li, kiel la israelanoj, eniris la militon kontraŭvole. [...] La reĝo aldonis ke, dum la tuta periodo de la militaj operacioj, liaj fortoj ne transiris la limojn de la juda ŝtato difinitaj de la rezolucio de la Unuiĝintaj Nacioj. Envere, diris li, iliaj respektivaj fortoj alfrontiĝis nur en Jerusalemo, kaj estis la israelanoj kiuj provokis la batalon”*. Komento de Avi Ŝlaim: *„Estus malfacile kontesti la version de Abdallah, kaj Ŝarett ne provis fari tion. Abdallah diris ke li ne volis ekmiliti, sed ke serio da eventoj komencanta per Deir Jassin kaj finiĝanta per la rompo, fare de la israelanoj, de la batalhalto en Jerusalemo, devigis lin agi. Ankaŭ Abul Huda ne volis la militon kaj restis fidela al la limigita strategio por kiu li estis*

akirinta la sekretan konsenton de Britio [...] Malrekte, Abdallah asertis nun ke ne estis li, sed la judoj kiuj malrespektis la sekretan interkonsenton kiun ili faris pri la divido de Palestino”⁵⁴...

54 Saml., p. 450 kaj 452.

Ĉapitro 3

Fulmrapide

„La registaro de Israelo devas nei ĉian respondecon pri la starigo de tiu problemo. La akuzo laŭ kiu tiuj araboj estis forpelitaj perforte fare de la israelaj aŭtoritatoj estas totale falsa; male, ĉio estis farita por malhelpi tiun eliradon.”¹ Jen kio klarigas, ekde julio 1948, eminenta respondeculo de la israela ministrejo pri eksterlandaj aferoj responde al sia usona kolego. Tia estis poste, kaj tia restis, principe, la oficiala historio de la eliro de la palestinaj araboj – oni povas taksi ilian nombron je proksimume 800.000² – inter la divi-doplano de la 29-a de novembro 1947 kaj la lasta israela-ar-

1 Ilan Pappé, *The Making of the Arab-Israeli Conflict, 1947-1951*, I. B. Tauris, Londono kaj Novjorko, 1992, p. 214.

2 La nombro da elpelitaj palestinanoj estas kontraŭdire taksata. Laŭ la raporto de la Komitato pri Translokado, subskribita de Jozef Weitz, Ezra Danin kaj Zalman Lifschitz, ili estis 460.000 fine de novembro 1948. Elirante de la popolnombrado de la 31-a de marto 1947, aplikante al ĝi la kvoton de natura kresko konstatita en 1946 kaj deprenante la nombron da araboj restintaj en Israelo, la demografino Janet Abu Loughod venas al totalo de 770.000 ĝis 780.000 palestinanoj delokitaj en la momento de la batalhaltoj. En la sama periodo la Oficejo pri Helpoj kaj Laboroj de la Unuiĝintaj Nacioj por la palestinaj rifuĝintoj (UN-RWA) donas, siaflanke, la nombron de 900.000 rifuĝintoj. Fine, en *Collusion Across the Jordan*, Avi Šlaim citas la statistikojn de la Oficejo pri Rifuĝintoj de Ramalah de Muhammad Nimr Al-Hawari, kiu nombras en 1948 766.000 rifuĝintojn, de kiuj 200.000 en Gazao, 50.000 en la distrikto de Hebrono, 15.000 en tiu de Betlehero, 20.000 en Jerusalemo, 40.000 en Jeriĥo, 72.000 en Ramalah, 100.000 en Nabluso, 70.000 en Jordanio, 80.000 en Sirio, 100.000 en Libano, 14.000 en Egiptio kaj 5.000 en Irako.

aba batalhalto, okazinta kun Sirio, la 20-an de julio 1949. Estas tamen tute alia versio kiu aperas el la israelaj arĥivoj, tiuj kiujn priesploris, de dudek jaroj, certa nombro da historiistoj.

La unua kiu proponis ĝin estis Benny Morris, tiam diplomata korespondanto de la israela ĵurnalo en la angla *The Jerusalem Post*, gazeto tiuepoke sufiĉe kritika al la politiko de la israelaj registaroj.

La resto de la libro aldoniĝos iom post iom, kaj la tuta libro estos publikigota libroforme ĉe MAS en 2008. -vl